

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Konstruaj
kontaktoj
en Novjorko
kaj Parizo**



**Pli ol mil
Zamenhof/
Esperanto-
objektoj**



**Kampanjo 2000:
Multaj jam
fosas la sulkon**



Por firme ankri Esperanton

Enhavo

- 81 Estraro de UEA: Kio surtabliĝis? (István Ertl)
- 82 Jaro 2000: ni estas jam tie (Renato Corsetti)
- 83 Ekaj eĥoj tutmondaj
- 84 Eksteraj rilatoj: Decidaj demarŝoj en Parizo kaj Novjorko: Estrara impulso ĉe Unesko (Amri Wandel); Solidigo de NRO-kontaktoj (Amri Wandel); Stariĝos Koalicio por Internacia Lingvo
- 86 Instruado: Nova magistriga kurso en Budapeŝto; Interlingvistikaj studoj en Poznań; Evakuata el Albanio; Magra jaro ekzamena Akademio de Esperanto: Berveling demisias
- 88 Informado: Nederlandaj gejunuloj ne konas, sed favoras Esperanton Historio: Komuna kompreno Malferma Tago logis de Belgio ĝis Usono
- 89 Lingvo: Vortaristoj procedu pli kritike (Josef Kavka)
- 89 Kulturo: FAME helpas ne nur famulojn (Stefan Maul)
- 90 Reagoj: Akademio kaj UK-etoso (Michela Lipari); Ligilo jam ekzistas (Reinhard Haupenthal); Meditiga manko (Aldo de' Giorgi); Necesas bibliografioj de artikoloj (Oszkár Princz); Kalumnio al Zamenhof (Christoph Brandes); Memstudo de miraklo eblas (Aurelio Solís); Arbitraĵo disrompus unuecon (Frans Cobben); Misomaĝo al Ada (Jorge Camacho)
- 91 Forumo: Nova jarmilo bezonas novtipan kongreson (Senad Čolić)
- 92 Recenzoj: *Monumente pri Esperanto* (Ulrich Lins); *La metamorfozo kaj Sonĝo kaj aliaj rakontoj* (Jorge Camacho)
- 94 Foliume; Persone
- 95 Laste aperis
- 96 La diligenta kolegaro: Sezonoj floras en ĉiuj sezonoj
- 97 Loke – Fake
- 99 Oficiala Informilo
- 100 Nekrologoj; Anoncetoj

Vi trovos

printempan eferveskon de ideoj kaj agadoj sur la paĝoj de ĉi tiu maja numero. Konsciindas, kompreneble — kaj aparte en tutmonda organizo —, ke majo ne sam-sezono en ĉiu mondoparto, sed Kampanjo 2000, pri kies disvolviĝo plu detalas Renato Corsetti (p. 82-83), ja celas movadan printempon tutglobe. La tria kampanja celo (“influi la internacian vivon”) sonas aparte ambicie, sed eĉ unuopaj, nespektaklaj paŝoj sur ĉi tiu tereno povas tre gravi por la bonfarto de aliaj movadaj kampoj. (Pri niaj estraranoj-diplomatoj legu sur p. 84-85).

Premiso de progreso estas demandosigni eĉ niajn plej solidajn tradiciojn. Tial bonvenas diskut-artikolo pri Universalaj Kongresoj de Senad Čolić (p. 91), kiu proponas esencajn ŝanĝojn. Kion diros niaj regule kongresantaj legantoj?

La kovrilo: Ankaŭ la ŝarĝ-motorŝipo *Esperanto*, konstruita en 1923 (kiun fotisto Franĉjo Veuthey hazarde ekvidis sur Roterdamaj akvoj), estis inkludita en la “monumenta” libro de Hugo Röllinger pri Zamenhof/Esperanto-objektoj (recenzo sur p. 92).

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktotino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 61; USD 35; DEM 55; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifto (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ☎+39-6-39-72-61-69; ✉mc8750@mclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎+31-50-3613763 [of]; ✉A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ☎+1-613-565-9279; ✉mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ✉amri@vms.huji.ac.il.

Kio surtabliĝis?

Konsciaj pri la proksimeco de la jaro 2000 (vd. p. 82), la sep estraranoj de UEA dediĉis sin en tritaga kunsido (4-6 apr.) al demandoj kiuj, en si mem plej ofte malgrandaj, tamen influos la movadan transiron al nova jarmilo.

Multe da nederlanda kafo kaj spica korea supo, surtabligita de prezidanto LEE Chong-Yeong, tenis vigla dum tri plenaj labortagoj kaj tra 113 tagorderoj la kompletan UEA-estraron, observantojn Marija Belošević (ILEI) kaj Danny ten Haaf (TEJO), kaj la ĉeestantajn oficistojn de la CO. La ĵus patriĝinta kaj gratulata Ten Haaf, cetere, venis lastfoje al estrarkunsido de UEA kiel TEJO-prezidanto, ĉar li ne rekandidatiĝos por la posteno.


Konstatigis ke la Centra Oficejo daŭre speras troan laborŝarĝon, precipe en la Librotena Fako, kiu tamen baldaŭ devus ricevi helpon de partatempa dungito. La foj-fojaj plendoj pri ne-respondado de la CO malmultiĝas; fakte, eĉ en kazoj de plendo ofte temas pri tio ke iu mendo aŭ peto estas jam plenumita, sed la informo pri tio ankoraŭ ne atingis la plendanton.

Rilate la tradiciajn servojn: La Jarlibron oni antaŭvidas dissendi komence de junio. Pri ĉi tiu revuo, oni esprimis malkontenton pro la enhavo: ĝi devus krei etoson kiu pli mobilizas la legataron al kohera kunlaboro, en la spirito de Kampanjo 2000. La redaktotinoj daŭre iom prokrastiĝas pro la kreskanta alfluo de prilaborendaj informoj, senditaj pli kaj pli ofte per la komputila reto. La redaktoro de *Kontakto*, Franĉjo Veuthey, intencas demisii fine de la jaro. La trovota nova redaktoro laboros ekster la CO, dum Veuthey povos valorigi siajn grafikajn kapablojn en la aktiviĝanta Eldona Fako. (Post kelkajara eldona malvigleco, kaŭzita i.a. de grandaj investoj en la Jubilea Serio, jam prepariĝas pluraj titoloj por ĉi-jara eldono.)

Se paroli pri servoj maltradiciaj, ne eblis eviti la konstaton ke la pasintjare

fondita Komisiono pri Interreto ape-naŭ sukcesis aktiviĝi pro manko de tempohava kunordiganto; necesas tamen trovi solvon por la ĉi-terena lamado.

Finance, la nuna jaro devus esti malfacila por UEA pro la nekutime malgranda kongreso en Adelajdo, sed dank' al prudenta mastrumado verŝajne eblos ne transpasi la buĝetitan negativan saldon, kiu laŭ Komitata



Direktoro Pasquale Zapelli (maldekstre) precizigas ideon. Dekstre: Amri Wandel.

decido devas plu malkreski ĉiujare. Tio devus eblu ankaŭ ĉar la efektivaj enspezoj en 1996 konsiderinde superis la buĝeton, ĉefe dank' al la granda UK en Prago. Sekve oni povis rezervi parton el la pasintjaraj enspezoj por uzo en la nuna, pli malfacila jaro. Por sekvi la inflacion en Nederlando (laŭtakse 2,5% en 1997) la Estraro decidis altigi la bazan kotizon de Membro-Abonanto por Nederlando de 100 gld. al 103 gld. por 1998. Multaj landoj verŝajne tamen evitos kotiz-plialtigon, ĉar iliaj valutoj lastatempe plifortiĝis rilate al la guldeno.

La Estraro konstatas ke multo el la agado de UEA, okazanta kadre de ĝiaj fondaĵoj, estas ne sufiĉe "videbla" por la membraro, ĉar la spezoj de fondaĵoj ne aperas en la spezoekonto akom-

pananta la Estraran Raporton. Ekzemple por informado kaj eksteraj rilatoj UEA uzas ĉiujare grandajn sumojn, pri kiuj oni ĝenerale ne konscias. Tial pli ofte devus aperi artikoloj pri la fondaĵoj.

Pro tempomanko, Povilas Jegorovas devas rezigni pri sia fako informado; ĉar tiu laborkampo esence gravas por la laboro de UEA, ĝis la estraraj elektoj en 1998 oni almenaŭ klopodos trovi komisiiton pri informado.

Novaj ĉefdelegitoj estis nomumitaj por Bulgario, Italio kaj Japanio: respektive Petro Arnaudov, Mario Amadei kaj SATOO Ŝooiĉi. Novaj komisiitoj estas la italinoj Edwige Tantin-Ackerman, por Semajno de Internacia Amikeco — kies revivigon la Estraro forte esperas —, kaj Lilia Fabbretto (sekretario de Tutmonda E-ista Vegetarana Asocio), por rilatoj kun Nutraĵa kaj Agrokultura Organizaĵo (FAO) de UN.

Rilate ontajn kongresojn, la Estraro konsideras por la jaro 2000 la invitojn de Tel-Avivo kaj Zagrebo, kaj elektos en Adelajdo, aŭdinte la rekomendojn de Osmo Buller, kiu baldaŭ vizitos ambaŭ urbojn. La 83-a UK en Montpeliero (1998) jam havas siajn lokan kongresan komitaton (kun prezidantino Claude Nourmont) kaj

kongres-teman reĝisoron Renato Corsetti; la temo mem, rilata al la rolo de Mediteraneo kiel kunigilo de diversaj kulturoj, restas vortumenda. La adresaro de partoprenantoj en la Kongresa Libro reaperos ekde Adelajdo: la decido ne enpresu ilin — pro plendoj pri ilia misuzo — estis fakte unufoja por Prago.

Dank' al la laborema Amri Wandel, UEA nun pli vaste rilatas kun diversaj fakaj asocioj. Tamen, la Estraro konstatas malvalidiĝon de la kunlabora kontrakto kun Internacia E-Klubo Aŭtomobilista, pro ties malaktiviĝo. Simile povus okazi pri la pasiviĝinta Ateista Tutmonda E-Organizo.

Dum la kunsido mem alvenis letero de Armenia E-Asocio, kiu interesiĝas pri aliĝo al UEA.

István Ertl

Jaro 2000: ni estas jam tie

Lastatempe la internaciaj gazetaraj agentejoj decidis ke estas tempo informi la mondon pri la fakto ke restas nur malpli ol 1000 tagoj antaŭ la jaro 2000, do ke praktike jam ni estas tie. Ĝojigas raporti ke, almenaŭ unufoje, la Esperanto-movado antaŭis tiurilate la internaciajn gazetarajn agentejojn.

En la pasinta numero de ĉi tiu revuo la prezenta artikolo “Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo” (p. 62-64) invitis ĉiujn legantojn esprimi sian opinion pri la nova kampanjo lanĉita de la Komitato ĝuste je la nomo de la mita jaro 2000. Fakte, atentaj legantoj de komitataj protokoloj (aŭ de ties resumoj en revuoj) povas memori ke la ideo pri ĉi tiu kampanjo leviĝis dum la pasintjara Universala Kongreso, danke al stimulo de la prezidanto de UEA. Komitata komisiono eklaboris por produkti tekston pri ĝi. La teksto estis verkita kaj dissendita al ĉiuj komitatoj, por ke ili faru siajn rimarkojn kaj amendo-proponojn. Poste ĝi iris al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, por ke ankaŭ ili kontribuu per siaj rimarkigoj. La fina teksto, kiu konsideros ĉies proponojn, estos aprobita dum la venonta Universala Kongreso en Adelajdo.

Intertempe, tamen — kaj tie kuŝas nia antaŭeco — amaso da eventoj jam okazis kaj okazas, malgraŭ ke la fina teksto ankoraŭ ne ekzistas. Ankoraŭfoje ricevas pravigon la malnova latina proverbo “Dum en Romo oni diskutadas, [la urbo] Sagunto falas,” kiu avertas ke rapidaj faroj pli valoras ol longaj debatoj.

Granda plejmulto de la ricevantoj de la provizora teksto de Kampanjo 2000 decidis tuj ekfosi sian sulkon (kaj nur duarange interesiĝis diskuti pri la fosiloj).

Multaj komitatoj (tro multaj por citi ĉies nomojn) reagis pli-malpli jene: “Jam estis tempo por la movado fari ion, ni en-ujo estas pretaj, bonvolu sendi la inform-materalon, kaj ni tradukos kaj disvastigos ĝin!”

Cetere, ĉi tie ni devas mencii ke la Manifesto de la Esperanto-movado (kiu iusence estas la unua informilo de Kampanjo 2000) ricevis grandan subtenon per miloj da subskriboj de unuopaj esperantistoj, subtenon pri kies kresko vi povas legi en ĉiu numero de ĉi tiu revuo. Krome, en multaj lokoj oni sukcesis aranĝi informajn mirindaĵojn ĉirkaŭ ĝi. Mi estis impresita, ekzemple, de ĝia apero en islanda ĵurnalo kaj ĝia prezento en grekaj amasinformiloj, aŭ de la morala subteno voĉdonita al ĝi en kelkaj italaj urbaj konsilantaroj. Kaj mi estas nur parte informita pri ĉio kio okazis. Mi atendas amason da kritikaj reagoj de legantoj, kiuj riproĉos min ke mi ne citis tion kion ili faris.



Por ĉi tiuj Esperanto-lernantetoj de Trevor Steele (dekstre) en Montessori-lernejo de Perto (Okcidenta Aŭstralio) la nuna jarmilo estos nur infanaĝa memoro.

En multaj landoj la estraroj de la landaj asocioj dediĉis apartajn kunsidojn al Kampanjo 2000. Ree mi citas nur kelkajn kaj atendas riproĉojn de ne cititaj landoj. Kunsidoj okazis almenaŭ en Rumanujo, Francujo, Nederlando, Norvegujo, Italujo, Venezuelo, Brazilo, Aŭstrujo kaj Malto. Do, ankaŭ flanke de la landaj asocioj la reagoj estis kuraĝigaj — ankaŭ en la senco ke ĉiu el ili estis bazita sur taksado de la efektivaj fortoj en la koncerna lando. Neniu proponis ke “oni” triumfigu Esperanton unue en la tutgalaksia parlamento, sed ĉiuj diris pli-malpli: “Ni en-ujo povas fari ĉi tion.” Mi donu ekzemplojn kiujn mi konas bone. La itala landa asocio modeste deklaris: “Nu, se oni devas transiri al aktiva informado, ni povus sendi al ĉiuj urbaj bibliotekoj tra Italujo itallingvan libron pri E-o.” Venezuelo E-Asocio petis ke oni donu al ili malmultekostan lernolibron en la hispana, kaj ili konkeros Venezuelon. Ĝuste tiajn “modestajn” agadojn ni bezonas.

Oni sin demandas de tempo al tempo ĉu niaj landaj asocioj kaj niaj lokaj grupoj ankoraŭ havas signifon en la epoko de tutmondaj interretoj kaj televidaj satelitoj. Mi kredas ke jes. La laboro je monda nivelo havas signifon nur se lokaj homoj povas transformi la moralajn aprobojn de, ekzemple, Unesko al pli da lernantoj. Kredi ke Unesko faros nian laboron por ni: tio estas la vera utopio. Unesko povas esti por ni nur plua ilo por konvinki nekonvinkitojn, sed poste atendas nin la kutima laboro: informkunvenoj, kursoj, utiligo de la lingvo ktp.

La fakaj asocioj kaj aliaj movadaj instancoj reagis pli-malpli same. Mi citu nur la kazojn de la junulara kaj la instruista organizaĵoj.

TEJO esence diris: “Vi, maljunaj UEA-uloj, perdas vian tempon pro komitataj dokumentoj kaj kongresaj rezolucioj. Ni, la gejunuloj, estas multe pli kapablaj ol vi, kaj ni montros tion al vi kun aŭ sen Kampanjo 2000!”



Pli bonan respondon de vigla junulara asocio oni ne povis atendi.

La estraro de ILEI, siaflanke, prenis la aferon tre serioze, kiel oni prenas malfacilan lernejan taskon, kaj komencis starigi sian propran laborplanon pri mondaj lernejoj

kampanjoj, pri novaj lernolibroj ktp. Ĝi dissendis proponaron al siaj sekcioj por pridiskuto kaj, en sia pasinta estrarkunsido, decidis reaktualigi la UEA-rezolucion pri edukado aprobitan en la Viena UK. Ankaŭ la ILEI-kunsido kadre de la Eŭrop-Unia Esperanto-kongreso (Stuttgart, Germanio, 16-19 majo) traktos la kontribuon de ILEI al Kampanjo 2000. Je la instruada flanko, mi opinias, ni povos ricevi agrablajn surprizojn post mallonga tempo.

Ankaŭ la Estraro de UEA, kompreneble, komencis fari sian parton: sur p. 84-85 vi povas legi pri ĝia diplomatia agado en Parizo kaj Novjorko.

El ĉiuj flankoj, fakte, leviĝas la demando pri nova kunordigita agado por antaŭenpuŝi la movadon. La fakto ke multaj ekagis, kvankam ili estis petitaj nur konsili pri la kampanjo, estas pruvo pri tio ke agemo ne mankas, kaj ke multaj en la nuna movado sentas nekontenton pro la manko de celoj kaj agad-direktoj. Ni simple, kiel asertis UEA-prezidinto Tonkin en antaŭa artikolo, ne povas permesi al ni la lukson plu vivi senplane. Tion tre bele esprimis juna komitatano, Pascal Lécaille, en letero pri Kampanjo 2000: "Kiam entuziasmo, kiel mi, envenas la movadon por ion konkrete fari, li povas absolute elreviĝi".

La gvidantoj de la movado, je internacia, nacia kaj loka niveloj, havas la respondecon ne lasi junajn entuziasmojn elreviĝi. Eĉ la debatoj inter apogantoj de malsamaj movadaj strategioj (fina venko aŭ ne ktp) perdas sian signifon. Ĉi tie temas pri organizita klopodo levi la nivelon de la movado: nenio plia kaj nenio malplia. Ĉiu membro povas trovi sian lokon en ĉi tiu kampanjo. Ĉiu esperantisto devas senti sin respondeca pri tio ĉu jes aŭ ne la movado eniros la venontan jarmilon sur pli alta nivelo ol la nuna.

Renato Corsetti

Colle Rasto, IT-00016 Palestrina, Italio

Ekaj eĥoj tutmondaj

Plioftiĝas la informoj pri diversloka agado rilata al la Manifesto de Prago (aŭ Manifesto de la Esperanto-movado), kaj ankaŭ Kampanjo 2000 komencas vekti diskutojn tutmonde.

La Manifesto nombris la 23-an de aprilo 7211 subskribojn. La kolektado de subskriboj plu daŭras. Kartojn por 4 nomoj kaj foliojn por 20 nomoj oni povas senpage ricevi de UEA. Krome oni rajtas kopii ilin kaj represi ekz. en landaj kaj lokaj gazetoj kaj bultenoj. La Informa Fako disponigas diverslingvajn tradukojn laŭ peto. Elektronikaj variantoj en pluraj lingvoj estas legeblaj en la TTT-paĝo de Sveda E-Federacio: <http://www.esperanto.se/>.

Ĝus aperis persa traduko de la Manifesto, fare de Irana E-ista Junulara Organizo, dissendota al amas-komunikiloj, universitatoj, kulturcentroj k.s. (M. Reza Torabi)

En Cluj (Rumanio) la lokaj gazetoj *Szabadság* (hungarlingva) kaj *Mesagerul Transilvan* (rumanlingva) aperigis, la 14-an resp. la 15-an de aprilo, la tekston de la Manifesto, kun akompanaj artikoloj pri E-o. (I. Onet)

La hispana E-grupo Antaŭen (Avilés) organizis en gazetara klubo prezentadon de la Manifesto. Komentojn de la klubestro José Martínez sekvis vigla diskutado de la ĉeestantoj, kies plejmulto subskribis la dokumenton. (*Boletín*)

Sine de la estraro de Japania E-Instituto stariĝis subkomitato pri la Manifesto, kaj tra la lando okazadis kun-sidoj por ĝin studi. En unu tia kunsido, en Kumamoto, la partoprenantoj forte malkontentis pri la dokumento, juĝante ĝin tro fora de la reala vivo. (*La Revuo Orienta*)

La prezidanto de Malta E-Societo, d-ro Carmel Mallia, malt-lingvigis kaj disdonis la Manifeston al parlamentanoj, juĝistoj, lernejestroj kaj profesoroj pri lingvistiko.

Multaj komunaj temoj ligos Kampanjon 2000 kun Internacia konferenco pri la strategiaj problemoj de la e-ista komunumo, kadre de la aranĝo Eŭropo-Azio '97 (9-17 aŭgusto, Jekaterinburgo, Rusio). La temojn enkondukos organizanto Aleksander Korĵenkov, komitatano de UEA kaj membro de Esperanta PEN-Centro (adreso: RU-620077 Jekaterinburg-77, p.k. 67, Rusio; ☎+7/3432/224-501, 235-785; ✉hrgo@sbank.e-burg.su). ★



Decidaj demarŝoj en Parizo kaj Novjorko

Post sia kunsido en Roterdamo, estraranoj LEE Chong-Yeong, Renée Triolle kaj Amri Wandel vojaĝis al Parizo por gravaj rendevuoj kun Unesko-funkciuloj kaj kun reprezentantoj de neregistaraj organizoj (NRO-j). Samtempe Mark Fettes diplomatis en Novjorko, prepare al starigo de Koalicio por Internacia Lingvo.

Estrara impulso ĉe Unesko

La 7-an de aprilo prezidanto LEE Chong-Yeong, vicprezidanto Renée Triolle kaj estrarano Amri Wandel renkontiĝis en la Pariza Unesko-sidejo kun Andri Ĥaksson, direktoro de la Departamento de Mezlerneja kaj Profesia Edukado — kiu nun anstataŭas la asistan ĝeneralan direktoron pri edukado, Colin Power —, kaj kun Joseph Poth, respondeculo pri la Unesko-programo Linguapax, kiu reprezentis Uneskon en la Nitobe-Simpozio de la Praga UK.

La islandano Ĥaksson bone memoris sian lastan interparolon kun UEA-estraranoj en oktobro 1995 (vd. nov. '95, p. 183), kaj ankaŭ la UK-n en Rejkjaviko (1977), en kies Honora Komitato li sidis. Krome li surprizis ĉiujn per la informo ke li iam renkontis Lidjan Zamenhof.

La delegacio prezentis iniciaton enkadrigblan al la programo Linguapax: UEA planas okazigi, samtempe kun la UK en Montpeliero (1998), internacian konferencon "Esperanto en lernejoj: Spertoj kaj perspektivoj". Pri tiurilata subvenci-peto Poth pli detale diskutis kun Wandel du tagojn poste. Ĥaksson kaj Poth opiniis ke la propono efektive konformas al la celo de Linguapax, kiu estas eduki al internacia amikeco per lingvo-instruado. Ĥaksson rekomendis serĉi subtenon ankaŭ je nacia nivelo. Krom libro-donacoj, la estraranoj transdonis informdosieron pri la agado de UEA, precipe rilate la kunlaboron kun Unesko kaj NRO-j, kiu montriĝis tre utila ankaŭ dum la postaj renkontiĝoj kun ĉi ties reprezentantoj.

En la sekvaj du tagoj Wandel restis en Parizo por pluaj rendevuoj. Kune kun la reprezentanto de ILEI ĉe Unesko, François Lo Jacomo, li renkontis la novan ĉefon de la Fako por Rilatoj kun NRO-j, Michael Millward.

Kiel konate, Unesko pasintjare decidis funde revizii siajn rilatojn kun la

NRO-j, cele al pli efika kunlaboro, kaj redukti de pli ol 600 al 300 la nombron de NRO-j en formalaj rilatoj kun ĝi. Unue UEA troviĝis inter la NRO-j "forigotaj" (vd. jul.-aŭg. '96, p. 121), sed nun, antaŭ la baldaŭa decido pri la nova statuso de NRO-j, ĝia pozicio ŝajnas pli bona. Unesko pretas plu havi rilatojn kun organizoj

landaj Unesko- kaj landaj Esperanto-asocioj. Alifanke, eblas vastigi la kunlaboron, ĝis nun fokusitan al la Eduka Sektoro de Unesko, al aliaj sektoroj, precipe tiu pri komunikado. (La fina "ko" en la nomo de Unesko.) Wandel kaj Millward korespondos pri la specifaj interesoj kaj proponoj de UEA en ĉi tiuj kampoj.

Per la helpo de Richard Halperin, estro de la Sekcio por Duagrada Edukado, kiun Wandel konas ekde la vizito



Ĉe Unesko en Parizo, de maldekstre: Joseph Poth, respondeculo pri la programo Linguapax; Renée Triolle; Andri Ĥaksson, direktoro de la Departamento de Mezlerneja kaj Profesia Edukado; LEE Chong-Yeong.

kies kunlaboro etendiĝas al pli ol laŭtlegado de Unesko-salutoj en iliaj konferencoj kaj ol regulaj agad-raportoj: devas temi, ekzemple, pri okazigo de seminarioj pri temoj interesaj por Unesko, aŭ pri komunaj publikigaĵoj. Por tiaj celoj ankaŭ eblas kaj indas peti subvenciojn de Unesko.

Laŭ ĉi tiu aspekto, la aranĝo de la Nitobe-Simpozio en la Praga UK trafe atestis la seriozan kunlaboron de UEA pri Unesko-koncernaj temoj; cetere, ankaŭ pretiĝas ĉe UEA esperantigo de la Unesko-eldonaĵo "Kulturo kaj teknologio". Sendube eblas trovi pluajn temojn kaj projektojn por kunlaboro inter diversaj Unesko-instancoj kaj UEA. Tia kunagado povas okazi ankaŭ sur nacia nivelo, inter

en 1995, preskaŭ spontane rezultis rendevuo kun la estro de la Sekcio por Scienca kaj Teknika Edukado (SSTE), Orlando Hall. Profitante la entuziasmiĝon de Hall pri la ideo kaj realo de Esperanto, Wandel improvizis plurajn sugestojn por konkreta kunlaboro. Prezertinte la kursojn de Akademio Internacia de la Sciencoj, la Internacian Kongresan Universitaton kaj la komunajn AIS/IKU-sesiojn, li proponis ke SSTE kaj UEA provu venigi al la IKU-sesioj kunlaborantojn de SSTE el la lando kie okazas la UK. Tiucele SSTE aperigos informon pri la IKU en sia kvaronjara bulteno *Connect*, ekde nun regule sendota al UEA.

*Amri Wandel
Estrarano pri faka kaj scienca agado*

Solidigo de NRO-kontaktoj

Jam komence de sia mandato, en 1995 estrarano Amri Wandel vizitis la sidejon de pluraj NRO-j en Parizo por establi kontaktojn inter ili unuflanke kaj UEA kaj fakaj asocioj aliflanke (vd. dec. '95, p. 207). Dum la vizitoj ĉi-jaraj temis jam pri solidigo de tiuj kontaktoj per iniciatoj de konkreta kunlaboro. Denove montriĝis ke personaj kontaktoj estas la plej efikaj: en la preparo de la rendezuoj multe helpis la pasintjaraj konatiĝoj kun NRO-representantoj.

La plej intensa kontakto okazis kun Internacia Asocio de Universitatoj (IAU), unu el la plej grandaj kaj riĉaj NRO-j, en kiu membras miloj da universitatoj tra la mondo. Ekde 1995 Wandel korespondis kun ĝia direktoro pri kunlaborado, Eva Egron-Polak, por krei kontaktojn inter IAU kaj Akademio Internacia de la Sciencoj, konsiderebla kiel universitato. Aliĝo de AIS al IAU ja signifus gravan rekonon de la Esperanta scienca agado. Ĉar Egron-Polak interesiĝis pri la Nitobe-Simpozio, Wandel prezentis ĝin kaj samokaze invitis IAU al la seminario pri "Esperanto en lernejoj", planata por la Montpeliera UK (1998). IAU kaj UEA regule interŝanĝos informojn; IAU skribos en sia novaĵletero pri Internacia Kongresa Universitato kaj tiel invitos tien reprezentantojn de lokaj universitatoj.

Renkontiĝo kun alia grava sciencrilata NRO, Internacia Konsilio de Sciencaj Unioj (ICSU), ne povis efektiviĝi, ĉar ĝi ne havas konstantan reprezentanton ĉe Unesko, sed la letera kontakto daŭros kun ĝia vicprezidantino, J. Marion Lefèvre.

Tute speciala NRO kun prestiĝa pozicio ĉe Unesko estas Eŭropa Akademio de Sciencoj, Artoj kaj Beletro, kies relative malmultaj membroj estas ĉiuj anoj de naciaj akademioj, multaj el ili Nobel-premiitoj. Ili ricevas esplor-taskojn pri specifaj temoj rekte de la ĝenerala direktoro de Unesko, Federico Mayor. Dum longa kaj utila rendezuo kun ĝia prezidanto, prof. Raymond Daudel, estis trovitaj pluaj ebloj de kunlaboro. La prezidanto notis la planatan seminarion de UEA kaj proponis plilarĝigi ĝian temon tiel ke ĝi

rilatu al Mediteraneo — prioritata temo de Unesko kaj de Eŭropa Akademio, kaj samtempe la kerno mem de la kongresa temo de Montpeliero. Prof. Daudel invitis reprezentanton de UEA al konferenco de Eŭropa Akademio pri malaperantaj lingvoj, okazonta en septembro 1998 en Joensuu (Finnlando).

Rendezuo kun Patrick Gallot, prezidanto de Monda Federacio de Unesko-Klubo kaj elektita prezidanto de la NRO-Konsilio, montris ke li persone tre interesiĝas pri Esperanto, sed ke la kunlaboro plej efike pasos tra la kanalo de regionaj vicprezidantoj. UEA do rekomendas al siaj landaj asocioj kontakti la naciajn Unesko-klubojn kaj -organizaĵojn pere de la regionaj vicprezidantoj.

UEA servos al SERVAS

Kvankam ĝi ne estas NRO en rilatoj kun Unesko, SERVAS estas tre interesa partnero por UEA. La Esperant-noma SERVAS, inter kies oficialaj lingvoj estas Esperanto, kreis post la dua mondmilito por antaŭenigi internaciajn laboradon, studojn kaj vojaĝadon. Ĝi plej sukcesis en la lasta kampo, ĉar ĝiaj ĉ. 20 mil membroj tra la mondo (inter kiuj ankaŭ esperantistoj) formas gastigan reton tre similan al Pasporta Servo. La eŭropa kunordiganto de SERVAS, Bertrand Bailleul, nun organizas premieran Someran Universitaton por ĉ. 200 SERVAS-membroj en Teplice (Ĉeĥio, 10-16 julio), kaj ŝatus enprogramigi Esperanto-kurson. Post korespondado kun la CO de UEA, tiu plano survojas al realiĝo, sub kunordigo de la ĉeĥia ILEI-sekciestro, Miroslav Malovec. Renkontante Bailleul, Wandel proponis plilarĝigi la temon de la kurso, al spertoj de E-vojaĝado kaj Pasporta Servo.

Plia kontakto okazis kun prof. David Levy, sekretario de Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj (IAU-PL), kiu nun pozitive traktas la aliĝpeton de AIS.

Ne realiĝis rendezuo kun André Jaegle, ĝenerala sekretario de Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj (WFSW), sed laŭ posta telefona interparolo li opinias pensebla la partoprenon de tiu Federacio en la Montpeliera seminario de UEA.

Amri Wandel

Stariĝos Koalicio por Internacia Lingvo

Lige al starigo de Koalicio por Internacia Lingvo — konsistonta el reprezentantoj de NRO-j en rilatoj kun UN kiuj deziras elpaŝi internacie, en taŭgaj forumoj, por lingve demokratia internacia komunikado —, estrarano Mark Fettes havis en Novjorko plurajn preparajn renkontojn la 7-an kaj 8-an de aprilo. La Koalicio, kiun kunordigas Fettes, estos lanĉita la 8-an de majo, okaze de Novjorka seminario kun la temo "Alfronti la lingvokrizon: Roloj por NRO-j kaj por UN". La 9-an de majo sekvos ĝin la ĉiujara konferenco de Centro de Esploro kaj Dokumentado, pri "Lingvaj rajtoj kaj lingvaj respondecuoj".

Por prepari la seminarion kaj la lanĉon de la Koalicio, Fettes kunvenis kun Rochelle Grossman (UEA en Novjorko), Marco Perduca (Transnacia Radikala Partio), Nikoo Mahboubian (Bahaa Internacia Komunumo) kaj James Morton (Templo de Interkompreno). Krom ili, kunlaboros Mondfederisma Movado. Ili ĉiuj forte subtenas la ideon malantaŭ la Koalicio: ligi la demandon pri internacia lingvo al la temo de homaj rajtoj.

La programon de la CED-konferenco Fettes unue pritraktis kun Françoise Cestac, iama asista ĝenerala sekretario de UN respondeca pri lingvaj servoj. Poste li preparolis kun Cestac, Nina Sibal (direktoro de Unesko en Novjorko) kaj Andrew Radolf (ties vicdirektoro pri informado kaj eksteraj rilatoj) la kontribuon de Unesko al la CED-konferenco, kiun ĝi jam akceptis aŭspicii.

Fine, Fettes renkontiĝis kun d-rino Purificación Quisumbing, reprezentanto en Novjorko de la Alta Komisito pri Homaj Rajtoj, kaj direktoro de la Novjorka oficejo de la Ĝeneva Centro por Homaj Rajtoj. Kiel ĉi ties oficiala reprezentanto, ŝi mem referos en la CED-konferenco. Ŝi faris plurajn bonajn kaj konkretajn sugestojn pri ebla daŭrigo de la agado post la konferenco. ★

Nova magistriga kurso en Budapeŝto

En la Esperanto-fako de Universitato ELTE komenciĝos nova kurso por eksterlandanoj en septembro 1997.

La aliĝkondiĉoj estas la ĉi-sube listigitaj:

1. La internacia kurso estas post-diploma: tio signifas ke oni rajtas komenci la studojn havante jam universitatan diplomon "MA" (magistra grado), liveritan en ajna universitato. Altrerneaj aŭ alitipaj superaj studoj ne validas. Oni devas enskribiĝi persone (laŭeble en junio), tiam kunporti la originalan diplomon kaj *validigi ĝin*. La enskribiĝo kostas 300 USD kaj ĉiu semestro 1000 USD.
2. La studoj daŭras *ok semestrojn*. Oni devas veni dufoje jare, en septembro aŭ junio kaj fine de januaro/komence de februaro, kaj pasigi en Budapeŝto po ĉ. 8-9 tagojn.
3. Fininte la studojn, oni ricevas magistran filologian diplomon.
4. La kursoj okazas en Esperanto, tial oni devas bone scii la lingvon.
5. La vojaĝ- kaj restadkostojn oni mem devas pagi.
6. La aliĝo okazu laŭeble ĝis la 31-a de majo, maksimume ĝis la 15-a de junio.

7. Kun la aliĝo sendu: detalan biografion verkitan en Esperanto, fotokopion de universitata diplomo kaj ĝian Esperantan tradukon. Adreso: Eötvös Loránd Tudományegyetem,

Bölcsészettudományi Kar, Általános és Alkalmazott Nyelvészeti Tanszék, dr. Varga-Haszonits Zsuzsa, Piarista köz 1, HU-1052 Budapest, Hungario. ★



Foto: Stéphane Dupin

La 22-an de januaro magistrigis pri Esperanto en la Universitato Eötvös Loránd (ELTE) de Budapeŝto (starantaj, de dekstre) Stéphane Dupin (Francio), Lidija Turĉenko-Grøsfjell (Norvegio), Michele Gregory-Zielinski (Usono) kaj Choe Taesok (Koreio). Ekzamenis ilin (staranta maldekstre) d-ro Árpád Máthé, (sidantaj, de maldekstre) d-ro Iván Bujdosó kaj la plentempa instruistino de la fako, d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits.

Interlingvistikaj studoj en Poznań

La Universitato Adam Mickiewicz (UAM, la dua plej granda universitato en Pollando) anoncas 3-jaran eksteran studadon pri interlingvistiko. La unua studjaro startos en la vintra semestro de 1997/98. La internacia kurso okazos sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, kun subteno de prof.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Berveling demisias

Gerrit Berveling petis diskonigi:

“Pro gravaj kialoj, i.a. personaj kaj profesiaj, mi demisias kiel vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto. Mi bedaŭras ke tiun ĉi decidon mi devis fari. Sed simple ne eblas fari ĉion samtempe. *Breda, 14-an de aprilo 1997*”

Tadeusz Zgółka. Inter la prelegontoj estas konataj esperantologoj, kiel profesoroj D. Blanke, M. Duc Gonninaz, H. Tonkin, T. Tyblewski, J. Wells, d-rino K. Smidéliusz kaj L. Ligeza.

La interlingvistikaj studoj konsistos el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, el internacia kaj interkultura komunikado, ili traktos planlingvojn kaj detale okupiĝos pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblos specialiĝi ankaŭ pri metodiko.

Surloka kurso okazos unufoje dum la semestro (lastan semajnon de aŭgusto kaj de januaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos Atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Antaŭ la universitata sesio okazos kurso por tiuj kiuj bezonas perfektigisian lingvoscion. La kurson povas partopreni ankaŭ tiuj kiuj ne intencas studi poste.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo ĝis la 30-a de junio. Postulo: finitaj studoj en mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de Esperanto. Kotizo por unu semestro: 600 USD (por nepagipovaj landoj 250 polaj zlotoj = ĉ. 80 USD).

Por pluaj informoj kaj aliĝilo kontaktu d-rinon I. Koutny: Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz, ul. Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań, Pollando; ☎ +48/61/618-572 (sekretario); ✉ ikoutny@hum.amu.edu.pl. ★

Evakuata el Albanio

Marija Belošević, sekretariino de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj (ILEI) kaj de Kroata E-ista Unuiĝo (KEU), revenis el movada vizito en Albanio pli frue ol planite.

De pli ol kvar jaroj KEU kaj ILEI helpas la E-movadon en Albanio per kolektado kaj sendado de instru-materialoj. Dum kelka tempo KEU prizorgis la presadon de la revuo *Albana Esperantisto* en Zagrebo, kaj dufoje gastigis tie albanajn E-grupojn (okt. '96, p. 177). Marija Belošević, motoro de tiu agado, jam de 1992 ŝuldis viziton al Albanio, laŭ invito de Albana E-Ligo kaj de la landa sekcio de ILEI, kiun estras la tre aktiva Bardhyl Mezin.

Alveninte la 2-an de marto al Tirana, ŝi planis i.a. renkontiĝi kun diversaj ŝtatoficistoj. Kvan-kam pluraj rendevuoj ne realiĝis pro la politika stato — tutlanda malsekureco pro popola indigno pri la kolapso de la t.n. “piramidaj fondusoj” —, Belošević estis tamen intervjuita por la nacia instruista gazeto kaj akceptita en la eduk-ministerio, de la ĉefinspektoro pri instruado de lingvoj en ĉiunivelaj albanaj lernejoj. Bone informita pri la enlanda E-instruado,

la funkciulino aparte ĝojis ekscii ke albanaj instruantoj ĵus ricevis, donace de Internacia E-Instituto en Hago, la videokurson *Mazi* kun akompanaj materialoj.

Sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI laŭplane okazis en Tirana, malgraŭ nefunkciado de ler-



Helikoptero de la itala armeo ellandigis Marija Belošević, el Tirana sporttereno.

nejoj kaj ekvalidiĝinta malpermeso de publikaj kunvenoj por pli ol 3 homoj. Kolektiĝinte en privataj loĝejoj, naŭ kandidatoj — je elementa kaj meza niveloj — montris tre bonan konon lingvan kaj movadan.

En privata galerio malfermiĝis ekspozicio, organizita de KEU origine en Zagrebo dum la vintro, el desegnaĵoj de ĉ. 400 infanoj el 13 landoj, kun la temo “Mia novjara mesaĝo”. Ekde la komenco de la eksterordinara stato en Albanio ĉi tiu ekspozicio estis preskaŭ la sola kultura evento.

Ekster la ĉefurbo, Belošević vizitis la prezidanton de Albana E-Ligo, Agim Peraj, en Shengjin, kaj e-istojn en Shkodër — i.a. Zef Mjeda, Honoran Membron de UEA, kiu malgraŭ serioza malsano finpretigas sian grandan vortaron Esperantan-albanan. (Donacoj por ĝin eldoni bonvenas al Konto Albana, starigita de UEA tiucele.)

Post kiam komen- ciĝis pafadoj la 12-an de marto, Belošević devis rezigni pri vojaĝo al la urbo Durrës. Helpe de la kroata ambasado, al kiu Bardhyl Mezin bicikle transportis ŝiajn pakaĵojn, la 14-an de marto ŝi ricevis lokon en evakua transport-helikoptero de la itala armeo, flugis al la itala havenurbo Bari

kaj revenis al Zagrebo laŭ sufiĉe longa kromvojo. ★

Magra jaro ekzamena

En sia oka jaro, la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI trapasis la sojlon de entute 500 sukcesintoj ekde la komenco en 1989. Tamen, la jaro 1996 ne estis unu el la elstaraj: En la 12 sesioj, okazintaj en 8 landoj de 4 kontinentoj, nur 30 kandidatoj trapasis sukcese la ekzamenon elementan, kaj 15 la meznivelan; entute 45 diplomitoj, la plej malalta cifero de post 1990. El ĉiuj sukcesintoj, 34 partoprenis en iu el la 6 eŭropaj sesioj, kaj plejparto (25) estis enskribita por unu el la 3 ĉefiaj sesioj dum kaj ĉirkaŭ la UK. En 1996 la duan fojon eblis ekzameniĝi en blindula kongreso: post la debutaj 4 kandidatigoj en 1995, pasintjare jam 7 homoj aliĝis; en ambaŭ jaroj sukcesis ĉiuj.

La komisionon pri la ekzamenoj nun prezidas Atilio Orellana Rojas (Argentino). Informiĝu pri venontaj ekzamen-sesioj ĉe la nova sekretario: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard; ☎+31/72/571-79-18; ✉574-76-70; ✉ten.hagen.esperanto@pi.net. ★

Somerkursoj per E-o

Novaĵo minutojn antaŭ redakto-fino:

Atendataj de pluraj jaroj, internaciaj somerkursoj je antaŭ-universitata nivelo fine devus okazi, inter la 16-a kaj 24-a de julio, ĉe la Universitato de Santiago de Compostela (Hispanio). Temoj: poezio de García Lorca (Miguel Fernández), eŭropa juro (prof. Rafaela Urueña) kaj astronomio (prof. D. Galadí). Aliĝu ĝejnuloj antaŭ la 1-a de julio ĉe Antonio Alonso Núñez, Rosa, 26-5°-C, ES-15701 Santiago de Compostela, Hispanio; ☎/✉+34/81/598-005; ✉iespnto@usc.es.

Nederlandaj gejunuloj ne konas, sed favoras Esperanton

La landa asocio Esperanto Nederland mendis de la profesia esplor-instituto NIPO opiniosondon rilate la scion kaj ideojn de nederlandanoj pri Esperanto.

Jen kelkaj rezultoj de la telefona esploro, direktita en januaro al reprezentiva grupo de 501 personoj inter 16 kaj 50 jaroj:

42% respondis ke ili ne scias kio estas Esperanto; same 42% tuj pensis pri “internacia lingvo”. (La ceteraj donis malĝustajn respondojn.) La “nesciantoj” konsistigas nur 21% ĉe 41-50-jaruloj, sed eĉ 66% en la aĝgrupo 16-30; “sciintoj” estas, preskaŭ inverse, 61% resp. 20%.

“Ĉu Esperanto povus plibonigi la internacian interkompreniĝon, se ĝi estus laŭgrade enkondukata, kiel neŭtrala helplingvo, ekz. ĉe UN aŭ EU?”

Al tiu demando 51% respondis jese kaj 36% nee. La jesantoj ĉi-foje plej multis ĉe la gejunuloj (16-30): 61% kontraŭ 26% da neoj; ĉe la mezaĝuloj (41-50) pozitivis 43%, negativis 41%. Laŭ edukiteco, malplej favoris homoj altnivele studintaj (42% jesis, 50% neis), kontraste al la favoro de homoj ne atingintaj mezgradan klerecon (56% jes, 24% ne).

Post kiam Esperanto Nederland dissendis gazetaran komunikon kun la frapfrazo “Majoritato en Nederlando subtenas Esperanton”, pluraj gazetoj reprenis informojn pri la NIPO-esploro.

Alia lastatempa mencio de Esperanto en nederlandaj gazetoj ŝuldiĝas al tute alispeca kialo. “BVD (Enlanda Sekureservo) registris kiu lernis Esperanton” — tiel titolis *De Telegraaf* depeŝon de la novaĝ-agentejo ANP, kiu temis pri la fakto ke BVD kompilis dosierojn pri 60% el la membroj de la asocio “Preventu Neniigon” (VVV). (La asocio batalas kontraŭ neniigo de dokumentoj en ŝtataj arkivoj.) Laŭ ANP, la dosieroj mencias ankaŭ eventualan partoprenon de la koncerna VVV-membro en Esperanto-kursoj, ĉar “evidente, jam la deziro lerni malfacile subaŭskulteblan lingvon estis suspekta”. ★



Foto: François Veurley

HISTORIO

Komuna kompreno

La japana-korea “E-grupo por komuna lernolibro pri historio”, kiu nomas sian agadon simbole “Papero kaj kapsiko” (la unua estis importita tra Koreio al Japanio, la dua inverse), aranĝos sian duan simpozion pri la rilatoj inter la du landoj inter la 29-a kaj 31-a de aŭgusto en Kobe (Japanio). (Pri la unua simpozio kaj la valora libro *Historio de Japanio kaj Koreio: Enkonduko*, eldonita de la grupo, vd. jul.-aŭg. ’96, p. 125 resp. 134.) Temo: “La azia pacifika milito kaj la memoro pri ĝi”. La simpozio celas kun konstrui komunan komprenon pri la rilathistorio de Koreio kaj Japanio per diskutado en Esperanto, sed ĝi havos ankaŭ malfermitan parton por koreaj kaj japanaj fakuloj diskutantaj kun interpretado. Bonvenos ankaŭ interesataj ne-koreoj kaj ne-japanoj, ekz. ĉinoj. Anonciĝu p/a NISIO Tutomu, Takadono 4-13-3, Asahi-ku, Oosaka-si, 535 Japanio; ☎+81/6/958-25-03; ✉-04; ☐nbg02407@niftyserve.or.jp.

Malferma Tago logis de Belgio ĝis Usono

J la sesa okazigo, la 19-an de aprilo, la Malferma Tago altiris 55 gastojn al la Centra Oficejo: krom nederlandanoj ĉeestis e-istoj el Argentino, Belgio, Francio, Germanio kaj Usono. Nora Bartels prezentis sian novan tradukon de *Taglibro de Anne Frank*, kiu fariĝis la plej furora vendaĵo de la tago, antaŭ *Monumente pri Esperanto*, la nova libro pri Zamenhof/Esperanto-objektoj. (Rabatante ĉiujn siajn varojn je 10%, la Libroservo enkasigis preskaŭ 4800 gld.) Ionel Oneț, oficisto de

la usona landa asocio ELNA, montris specimenon de la instrua vidbend-projekto *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* (vd. okt. ’96, p. 166). Atilio Orellana Rojas vidigis la portelevidan version de *Mazi en Gondolando* (vd. dec., p. 203). Aperis ankaŭ la neevitebla fraŭlino Emily Barlaston, kiu kantis, deklamis kaj vortludis je ĉies amuzo, kun spritaj pikoj al pli ol unu ĉeestanto. Ŝi daŭrigis sian klaĉadon ankaŭ en la kafĉambro de la CO (plej maldekstre, duonprofile). ★

Ĝustigo

La ĝusta nomo de “Esperanto-ŝtato de Mauresnet” (marto, p. 48) estas *Moresnet*. Dankon al Maurice Wouters pro la atentigo.

Vortaristoj procedu pli kritike

Neniu E-adepto povas kontesti la multflanke utilan rolon de Plena Ilustrita Vortaro por la unueca aplikado de nia lingvo. Tamen, dulingvaj vortaroj ne transprenadu sklave el PIV evidentajn erarojn.

Mi mem, kiu aŭdacas senti iom da kompetenteco pri ĥemio, mineralogio, petrologio, geologio, geografio, botaniko, zoologio kaj medicino, povas konstati densan svarmon da koncernfakaj misoj.

Jen hazarde prenita ekzemplo:

Se PIV tradukas *Acer pseudo-platanus* per “platanacero” kaj *Acer platanoides* per “plataneca acero”, ĝi kaŭzas nepran konfuzon. Ĝustaj tradukoj estus “acero pseŭdoplatana” (aŭ unuvorte “pseŭdoplatano”) kaj “acero platanoida” (aŭ unuvorte “platanoido”).

Atendeble, nacilingvaj-Esperantaj vortaroj altfidele kopias. Mi menciuj la plej freŝdatan kaj sendube bonegan, nome *Vocabolario italiano-Esperanto* de Minnaja (1996): *acero fico* = “platanacero”; *acero riccio* = “plataneca acero”! Ĉu al la eminenta aŭtoro mankis okazoj peti helpon de botanikisto, kiu kapablus rapide trarigardi ĉiun kapvorton de sia fako?

Tamen, por ne troigi kulpojn de PIV, mi ne hezitu malkaŝi ke multaj misoj ne fontas el tiu ĉi unika vortarego, sed estas produktitaj de nacilingvaj leksikografoj mem.

Jen alia ekzemplo:

Dum PIV prave difinas *erizipelo* kiel infektan haŭtmalsanon kaŭzitan de streptokoko, Krause (*Wörterbuch Deutsch-Esperanto*, 1983) tradukas *Rotlauf* per “erizipelo [de la porko]”. Sed *Rotlauf* signifas unue erizipelon de la homoj kaj due ruziopation de la porkoj, kaŭzitan ne de streptokoko, sed de *Bacillus rhusiopathiae*. Do, “erizipelo de la porko” ne ekzistas. La renoma aŭtoro estu konsultinta veterinaron.

Ĉi-okaze necesas atentigi ke ĝuste la komputorado de nacilingvaj-Esperantaj vortaroj inklinas generi tiuspecaĵojn, tre facile migremajn de vortaro al vortaro...

Resume: Vortaristoj, zorge atentu sciencajn vortojn, ĉar ili meritas reviziadon fare de koncernaj fakuloj!


Josef Kavka (Ĉeĥio)

KULTURO

FAME helpas ne nur famulojn

Denove FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj ebligas realigon de gravaj projektoj.

En la listo de la ĵus decidita subtenoprogramo elstaras ĉin-medicina fakvortaro, kiu prezentos la bazan sistemon de la aparta ĉina medicino. La kompilgrupo sub gvido de profesoro GU Jianhua ellaboris tiun ĉi ampleksan terminaron kun ĉ. 10 000 kapvortoj en la lingvoj ĉina, Esperanto, angla kaj franca; klarigojn la vortaro donas en Esperanto. Ĝi servos kiel nemalhavebla konsultlibro por interesiĝantoj pri la tradicia kaj mondfama ĉina medicino. Spite al la sindonemo de la kompila grupo, kiu rezignis pri iuj ajn pagoj, eldono de tia giganta verko kompreneble estas kosta: temas pri 4000 germanaj markoj. Ĉar tiu sumo kaŭzas problemon eĉ al la finance bone ekipita FAME, ĝi povas subvencii la projekton nur per 3000 markoj; pliajn 1000 markojn donos FAME-premiito Bruno Vogelmann, kiu jam de multaj jaroj diversmaniere subtenas ĉinajn esperantistojn.



FAME-Fondaĵo estis inter la subvenciantoj de ambaŭ volumoj de la E-muzika antologio *Vinilkosmo-Kompil*.

Alia scienca projekto kies realigon FAME finance apogas, estas studo de lingvistoj HIROSHI Nagata kaj Renato Corsetti, en la kampo de genera gramatiko, pri la lernoproceso de Esperanto depende de la fono kaj nivelo de la lernanto. Krome la fondaĵo per konsiderinda sumo subtenis la unuan

Esperanto-kultursemajnon en Aalen (Germanio). La eldonejo Heroldo de Esperanto ricevas subvencion por eldoni Esperanto-lernolibron en Bosnio. Inter la projektoj kiujn FAME-Fondaĵo subvenciiis en antaŭaj monatoj, estas ekzemple eldono de la originala romano *Iŝavasjam, la hejmo de Dio* de Aŝvinikumar, de la dua kompakt-disko *Vinilkosmo-kompil*, kaj de *Eŭropa kalendaro*. Cetere, ankaŭ por *Monumente pri Esperanto*, ĵus aperinta ĉe UEA, FAME donis subvencion de 5000 germanaj markoj.

Multaj pliaj projektoj atendas helpon de la fondaĵo, kiu tre ofte subtenas ankaŭ malpli kostajn, tamen valorajn iniciatojn, kiuj povas realiĝi nur per mono disponigata de FAME. Por subtenado la fondaĵo havas severajn kriteriojn. Tial ĉiu kiu donacas monon al FAME povas esti certa ke la helpo utilos al tiuj kiuj vere meritas ĝin. Do ne hezitu nutri per via mondonaco FAME-Fondaĵon, por ke ĝi laŭeble longan tempon povu daŭrigi sian benoriĉan agadon en la servo de interkompreniĝo tutmonda. Informilon volonte sendos al vi la prezidanto de FAME:

Stefan Maul
Pferseer Str. 15

DE-86150 Augsburg, Germanio

Reagoj



Akademio kaj UK-etoso

La letero de Perla Martinelli, ĝenerala sekretario de Akademio de Esperanto, pri ties publikaj kunvenoj en UK-oj (apr., p. 76) meritas kelkajn precizigojn.

Pro tio ke la UK-oj estas sendube la plej vizitataj E-aranĝoj, UEA donas tie eblon al malpli grandaj asocioj okazigi kunvenojn en salonoj kiujn UEA senpage aŭ kontraŭpage disponigas. Subtene al la agado de la plej prestiĝa lingva instanco de la Esperanto-komunumo, UEA zorgas pri senpagaj salonoj por la dumkongresaj kunvenoj (fermita kaj publika) de la Akademio, kiuj kunigas supozeble la plej grandan nombron da akademianoj tra la jaro. Ĉi tiu estas unu el la rektaj kaj malrektaj formoj de la UEA-subsidiado al la Akademio, kiuj kune sumiĝas je pli ol 4000 gld. ĉiujare — kalkulo kiu atingus preskaŭ 6000 gld., se la paĝoj regule dediĉataj al Akademaj temoj en ĉi tiu revuo devus aperi kiel pagitaj anoncoj.

Pri tio ĉu la etoso de niaj kongresoj estas nur “ĉarme turisma” — kiel asertas Martinelli, de 13 jaroj ne vizitinta Universalan Kongreson —, la kongresanoj povas mem juĝi.

Michela Lipari
Ĝenerala sekretario de UEA

Ligilo jam ekzistas

D. Blanke (“Kia sorto por la bibliotekoj?”, marto, p. 42) tuŝas plian vundon de nia Movado sen prezenti solvon.

Koncerne lian proponon de revuo *Interbiblioteke*: jam pasint-jare mi lanĉis la embrion de interbiblioteka ligilo, *La Biblioŝilo*, al kiu mi difinis jenajn celojn: “raporti el la vivo de la bibliotekoj, pri apartaj temoj bibliografiaj kaj bibliofilaj. En ĝi la bibliotekoj povus raporti pri siaj mankoj kaj la breĉoj ŝtopendaj. Ankaŭ la sinprezento de bibliotekoj povus okazi.” Bedaŭrinde la ĉo ege magris, sed *La Biblioŝilo* aperos

ankaŭ ĉi-jare. Interesiĝantoj bv. skribi al mi.

Pri la savo de libroj, UEA jam donis modelon per sia brokanta libroservo (kiu i.a. disvendis la bibliotekon de Teo Jung). Same faris Olda Libroservo en Danlando kaj la brokanta libroservo de Iltis-Eldonejo. Tiamaniere la libroj ne perdiĝas kaj revenas (kvazaŭ recikle) al novaj seriozaj kolektantoj.

Reinhard Hauptental (Schulstr. 30, DE-66133 Saarbrücken, Germanio)

Meditiga manko

La artikolo de H. Tonkin pri bibliografioj (jan., p. 10) igis min mediti pri iu grava manko ĉe ni. Se iu esperantisto deziras enprofundiĝi en la lingvon, aparte interesiĝas pri esperantologio kaj interlingvistiko, tiu renkontas egajn malfacilaĵojn. Praktike necesas traserĉi kaj aĉeti dise aperintajn kaj ne ĉiam facile troveblajn librojn kaj aboni plurajn gazetojn — kie, cetere, lastatempe nur tre malofte tiaspecaj studoj aperas. Ŝajnas al mi simple nekredinde ke ne ekzistas periodaĵo kiu okupiĝas aparte, eĉ se ne ekskluzive, pri tiuj problemoj.

Aldo de' Giorgi (Italio)

Necesas bibliografioj de artikoloj

Mi plene konsentas kun H. Tonkin: “Tiu kiu deziras serioze studi la fenomenon Esperanto aŭ, pli ĝenerale, la fenomenon interlingvistiko, alfrontas grandajn praktikajn obstaklojn.” Ĉi tiu obstaklo instigis min antaŭ du jaroj iniciati en Hungario pretigi plenan bibliografion de artikoloj aperintaj en *Hungara Vivo* kaj *Budapeŝta Informilo*. Ni esperantistoj petu la redaktorojn de E-lingvaj periodaĵoj ke ili ne nur kompilu bazan indekson — kiel faras ekzemple *Esperanto* —, sed ankaŭ aperigu bibliografion de artikoloj, kun mallonga priskribo de ties enhavo, por ke tiuj dormantaj trezoroj ne fariĝu neretroveblaj. Ankaŭ estas jam aktuale interkonsenti pri la komunaj

formo kaj formato de elektronikaj bibliografioj.

Oszkár Princz (Hungario)

Kalumnio al Zamenhof

Reage al la kurba mispaŝo de B. Golden (jan., p. 8):

Estas vere ke d-ro Zamenhof mem karakterizis sin kiel diletanton — sed tio atestas nur lian modestecon. Kion rajtas leono, ne rajtas... liaj malpli modestaj posteuloj. Kompari lian diligentan laboron al “okupo neprofesia, celanta nur plezuron”, tio ŝajnas al mi kalumnio. Tiu “diletanto” siatempe per profundaj lingvaj scio kaj intuicio disvolvis konceptojn pli ol duonjarcenton antaŭ profesiaj lingvistoj! Ĉar s-ro Golden jam anateme atendas kun lupo ĉeokule kaj krajono enmane, tial restas al mi nur esperi ke li de nun kondutos malpli arogante.

Karakteron al kanto donas la tonoj!

Christoph Brandes (Germanio)

Memstudo de miraklo eblas

Reage al artikolo de B. Golden (“La kimero de plena posedo”, feb., p. 32):

Mi ne havas la Manifeston de Prago antaŭ mi. Mi povas nur diri ke kiam mi legis ĝin, ĝi plaĉegis al mi. Mi povas ankaŭ diri ke se Mark Fettes havis “krakon en la kapo” kiam li asertis en ĝi ke “plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado”, ankaŭ William Auld havis ĝin kiam li publikigis la libron *Paŝoj al plena posedo*. Memkompreneble mi ne estas “plena posedanto de la lingvo” en la ekstreme rigora senco en kiu Bernard Golden komprenas tion; tamen ne nur mi, sed ĉiuj esperantistoj kiujn mi konas, praktike lernis la lingvon per memstudado. Mi konas nenion por kiu la kurso estis vere io pli ol instigilo. Eĉ se al Bernard Golden tio ne plaĉas, Esperanto estas lingva miraklo.

Aurelio Solís (Hispanio)

Arbitraĵo disrompus unuecon

Mi sentas la devon plendi pri la kvalito de kelkaj artikoloj en via bulteno ĉefa. En “Forumo” (jan., p. 16) oni trovas la tekston “Propono: Kerna Esperanto, pluraj aplikoj”. Ĉu vi lernis nenion el la fiasko de Ido? La t.n. “kerna Esperanto” estus arbitra, kaj la unueco



Nova jarmilo bezonas novtipan kongreson



Du lastatempaj deklaroj aperintaj en nia revuo pri la Universala Kongreso de Esperanto, la ĉefa kolono de la tutmonda E-movado, devus multe

zorgigi ĉiun seriozan aganton por nia afero. "Post jardekoj ne multo ŝanĝiĝis", diris dum la Praga UK Nobel-premiito Reinhard Selten (sept. '96, p. 149), kaj la ĉeĥa lingvisto Miroslav Malovec pritaksis ke "niaj UK-oj estas granda teatraĵo" (okt. '96, p. 176). Ili fakte aktualigis preskaŭ tabuan temon: kiel modernigi la plej gravan jaran manifestiĝon de nia movado, kiel igi ĝin ankoraŭ pli prestiĝa ekstere kaj pli utila interne, el organiza kaj financa vidpunktoj?

En la nuntempa mondo, en kiu ŝanĝoj okazas ne nur de tempo al tempo sed preskaŭ de tago al tago, insisti pri neŝanĝebleco de propra strukturo signifas aŭtomate: postresti. Konsentite: pri ĉi tiu temo surprize

mankas seriozaj studoj diversfakaj, kvankam pri la okazintaj 81 (!) kongresoj je dispono kuŝas abunda kaj verŝajne bone konservita dokumentaro. Kiel evoluis la programa koncepto de la Kongreso, pri kio ĝi entute okupiĝis, el kiuj sociaj grupoj konsistis la kongresanaro, kian eksteran eĥon ĝi vekis, kie loki la diversajn kongresojn en la historio de la movado (kaj de la tiutempa mondo?): jen nur kelkaj el la esplorindaj temoj.

Restas nur impresoj ke la unuaj UK-oj, sub verŝajna influo de d-ro Zamenhof mem, establis modelon gravan kiel por la komenca interna dinamismo de la movado, tiel ankaŭ por ĝia ekstera demonstriĝo. Post la dua mondmilito, sub la egido de d-ro Lapenna oni lanĉis novan modernigitan modelon, kies formulo el interna kaj ekstera vidpunktoj principe ne ŝanĝiĝis ĝis niaj tagoj.

Ĉu fine venis (aŭ bedaŭrinde jam de longe pasis?!) la tempo por alfronti novan modernigon almenaŭ en la strukturo kaj ekonomio de la plej granda manifestiĝo movada? Jen kelkaj komencaj sugestoj, kiuj eventuale povus ekigi senpasian debaton.

Koncerne la strukturon, la kongresa "semajno" konsistis el tri partoj: Antaŭ la centra "Kongreso" okazus tri-taga (vendredo, sabato, dimanĉo) (labor)konferenco de UEA kun aŭ sen ĉeftemo, kun aŭ sen neesperantistaj gastoj, kun ĉiuj komitatkunsidoj kaj necesaj elektoj. La oficiala malfermo estus aranĝata lunde (finfine dum normala labortago!), kaj ĝis vendredo evoluus la pritrakto de la ĉeftemo, la kulturaj, sciencaj kaj festivalaj programoj, kun kelkaj fakaj kunvenoj komplementaj al la ĉeftemo. Dum la postaj du-tri (post)kongresaj tagoj (sabato-lundo) okazus en la kongreslando kelkaj specialaj aranĝoj pri difinita aŭ rutina temo (eventuale kombinitaj kun interesaj turismaj programoj), organizitaj kunlabore kun la

koncernaj fakaj asocioj aŭ aliaj interesitaj grupoj. Tiujn aranĝojn la Kongresa Fakoj de UEA ĝustatempe enprogramigus kaj aktive okupiĝus pri ilia teknika organizado.

Ĉi tiu elasta strukturo donus pli da ebloj por partopreni unu, du aŭ ĉiujn tri partojn de la Kongreso kontraŭ unu kotizo. Krome, ĝi ebligus novan impulson al la kongresa ekonomio pro oferto de pliaj (novstilaj) aldonaj aranĝoj. Cetere, la UK devus multe pli emfaze esti merkata afero ol kiom ĝi nun ŝajnas tia. Multe malpli signifaj internaciaj asocioj sukcesas lastatempe bone "vendi" al ekstero siajn similajn aranĝojn. Pluraj niaj kongresaj programoj kaj aliaj aranĝoj same meritas tion. Ĉio dependas unuavice de nia lerto. Sed tiu ĉi temo bezonus apartan klarigon, eble aliloke kaj en medio de rekte interesitaj agantoj.

Ni ne fermu la okulojn, kaj nin ne devojigu la nuna stato. Antaŭ nur du-tri jardekoj la kongresojn de SAT vizitadis preskaŭ la sama nombro da partoprenantoj kiel la Universalajn Kongresojn, sed ni vidu la nunan situacion. La kongresoj de fervojistoj (IFEFF), iam imponaj, survojas laŭ lasta raporto al "emeritiĝo". Ĉu la UK kapablos lerni la lecionojn de siaj iamaj ĉefaj "konkurantoj" en la internacia E-movado?

Ni diskutu kaj laŭeble planu, por ke nova modelo de Universalaj Kongresoj estu lanĉita kun la nova jarmilo. Tio estus ĉi-kampe verŝajne la plej bona kontribuo al la lanĉota "Kampanjo 2000".

Senad Ĉolić (Bosnio kaj Hercegovino)

de nia lingvo disrompiĝus. La verkinto, Probal Daŝgupto, ankaŭ alte trotaksas la gravecon de "alternativa kulturo". Por ni ĝi havas iun signifon, sed por la cetera mondo ĝi estas nenio.

Frans Cobben (Nederlando)


Misomaĝo al Ada

Kun bedaŭro kaj ĉagreno mi legis noton (apr., p. 74) laŭ kiu "la numeroj aperintaj en 1997 ne nur tenis sed eĉ altigis la tradician nivelon de *Heroldo*". Kia misomaĝo al Ada Fighiera-Sikorska! Des pli ĉar granda parto el la enhavaj ŝanĝoj signifas nur pli da singlorado, cenzuro kaj mensogoj fare de bone konata koterio.

Jorge Camacho (Bruselo)

Kulturaj ĉefurboj kunlaboru

Kiel "eŭropaj urboj de kulturo en la jaro 2000" estis elektitaj Avinjono (Francio), Bergeno (Norvegio), Bolonjo (Italio), Bruselo (Belgio), Krakovo (Pollando), Helsinko (Finnlando), Prago (Ĉeĥio), Rejkjaviko (Islando) kaj Santiago de Compostela (Hispanio). La Esperanto-Grupo de Avinjono (55, boulevard Raspail, FR-84000 Avignon, Francio) alvokas al ĉi-kadra kunlaboro de esperantistoj en tiuj naŭ urboj, kaj eventuale akceptos esti ligilo por komuna agado.



Okulfrapaj formoj de publika rekono

Monumente pri Esperanto. Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj. Hugo Röllinger. Red. Thomas Bormann. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1997. 111p. 24cm. 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. 18,00 gld.

Unu tagon ni esperantistoj devis enkapigi novan mallongigon. Jen kaj jen, ĉiam pli ofte dum la lastaj jaroj, oni parolis pri ZEO-j. Kreskis

ke la Esperanto-movado, ĉefe pro la persistemo de lokaj esperantistoj, ja ricevis multe da publika rekono, eĉ en tre okulfrapa formo. Multaj

indikita en la hebrea, araba kaj latina alfabetoj. Sed ankaŭ ne mankas invito al demanda rideto: Kial strato nomita laŭ la bopatro de Zamenhof troviĝas ĝuste en la nordkimra vilaĝo Penrhyndeudraeth (por la prononco konsultu la antaŭan prezidanton de UEA)?

La aŭtoro bele spicas sian super-rigardon per anekdotoj ĉirkaŭ iuj ZEO-j: En Hispanio en la 60-aj jaroj estis pli facile akiri permeson por Esperanto-ol por Zamenhof-strato, ĉar la finaĵo *-hof* danĝere similis la sovet-rusajn nomojn tiel ofte finiĝantajn per *-ov*. Alispeca, sed fantazia strangaĵo estas la mesaĝo por eksterteruloj en Esperanto, kiu dank' al NASA kaj Ralph Harry ekde 1977



Zamenhof, liaj edzino kaj filino Sofia kun geesperantistoj en julio 1911 en la kuracloko Bad Kissingen (Germanio). Tiu ĉi historia foto konvinke ebligis, 80 jarojn poste, bronzan Zamenhof-tabulon kaj Esperanto-placon en Bad Kissingen, la hejmurbo de aŭtoro Hugo Röllinger. Ĉi tiaj spertoj instigis Röllinger dum ĉ. 30 jaroj enketi kolekti pruvomaterialon pri la disvastigo de la internacia lingvo, por faciligi ties pliiĝon.



la rondo de tiuj kiuj scias pri kio temas: "Zamenhof/Esperanto-objektoj", aŭ pli precize la projekto al kiu la germano Hugo Röllinger dum tri jardekoj dediĉis aman energion: la sistema registrado de stratoj, placoj, monumentoj, parkoj, pontoj, asteroidoj ktp nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto. Kaj nun fine aperis kion la sciantoj sopire atendis: libro kiu prezentas la ĉefajn fruktojn de la multjara esplorkonlaboro de Röllinger.

Ĝi estas multe pli ol nuda statistiko, kvankam imponas la ciferoj: pli ol mil objektoj en 54 landoj, el kiuj la plej multaj troviĝas en Brazilo, Francio kaj Pollando. Ili kune demonstras

ilustraĵoj akompanas la tekston. Ĉarma la foto kiu montras Marjorie Boulton kaj William Auld humile pozantaj kun busto de Zamenhof inter si. Iom kapturna la rigardo al la fortaj maŝinoj kiuj necesis por levi la plaj altan Zamenhof-monumenton en la mondo — en Sabadell, Katalunio, kies inaŭguron fine de 1989 mi ĉeestis nome de UEA. Nostalgiajn sentojn elvokas la rigardo al veraj homamasoj kiuj en majo 1914 plenigis novan Zamenhof-straton en la franca urbeto Sotteville-les-Rouen, ornamitan per granda transstrata rubando "Honora al Zamenhof". Esperiga la bildo de la Zamenhof-strato en Jerusalemo

daŭre flugadas en du kosmoveturiloj kaj post kvardek mil jaroj fine atingos la Laktan Vojon. Kvazaŭ detektiva rakonto legiĝas la priskribo de la "forgesita Esperanto-ŝtono" en Narvik (Norvegio). Kaj ĉu vi scias kiu estas la plej frua ZEO? Ĝi ne estas strato aŭ memorŝtono, sed ŝipo. Jam en 1896 estis konstruita en Hispanio la ŝipo *Esperanto*.

Al Hugo Röllinger, kiu estas Honora Membro de UEA, ni devas gratuli kaj danki pro la rezulto de longega, siavice monumenta laboro. Apartan rekonon meritas la lerta redakta pri-zorgo de Thomas Bormann.

Ulrich Lins (Germanio)

La insektiĝo

La metamorfozo (1912). Franz Kafka (1883-1924). Trad. Mauro Nervi. Pisa: Edistudio, 1996. 75p. 22cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 31. 24,00 gld.

Sonĝo kaj aliaj rakontoj. Franz Kafka. Elektis kaj trad. Wilhelm Luttermann. Dobřichovice: Kava-Pech, 1996. 102p. 20cm. 15,00 gld.


En 1996 eldoniĝis du esperantigoj de *Die Verwandlung* de Franz Kafka, pri subita insektiĝo de homo, eble la plej grava novelo verkita en tiu ĉi jarcento. Kiel skribas Nervi, en memorinda antaŭparolo, “ĝi komenciĝas per frazo, kiu senklarige kaj brutale kontraŭas ĉiun realisman priskribon, sed surprize oni ja povas pruvi, ke ĉiu alia vorto en la tuta novelo estas plej rigore normala kaj racie konsekvenca”. Ĝian influon sur la detiamaj literaturoj oni, efektive, ne povas kalkuli: ĝi atingis la verkarojn de i.a. Jorge Luis Borges, Dino Buzzati, Julio Cortázar, Karel Čapek, Danilo Kiš, István Örkény kaj probable ankaŭ de iuj prozistoj esperantlingvaj. Asertas Nervi ke “Kafka neniam verkis *pri judoj* (kiel, ekzemple, Joseph Roth), li verkis *jude*”; simile eblus diri ke en kelkaj el siaj tekstoj ĉi tiuj aŭtoroj verkas ja kafke, eĉ se pri temoj supraĵe tute aliaj. Nuntempa junulo povus legi ĝin kiel fablon pri aidoso (verkitan en 1912!); kontraste mi, en la duversia relego, preferis turni mian atenton al la simboloj kiuj vivigas la rakonton, el kiuj min pleje impresas la alĵetita pomo, milionoble pli substancia ol la celobjekto de Vilhelmo Tell kaj iel ankaŭ pli ol la geneza frukto de sciado.

Unu el la du esperantigoj, *La transformiĝo*, aperas en la kolekto *Sonĝo* kune kun 16 rakontoj samaŭtoraj. La alia debutas sola, kaj alititole: *La metamorfozo*. Faris la unuan Vilhelmo Lutermano, germano; la duan Mauro Nervi, itala doktoro pri germana literaturo. Ĉar mia scio de la germana ne sufiĉas por kritiko de la fideleco al la originalo, kaj ĉar supozeble ambaŭ tradukistoj povis bone sin dokumenti, mi recenzas el la legpunkto de esperantisto simple deziranta konatiĝi kun la verko.

Bedaŭrinde, la tradukon fare de

Lutermano mi ne povas rekomendi. Nur pri lia titol-elekto mi volonte konsentas. Lia versio legiĝas peza, nur pene komprenebla en multaj frazoj. Kiugrade tio ŝuldiĝas nur al la strangeco de la originalo, kiel Lutermano argumentas en fina noto, mi ne scias; Nervi tute ne parolas pri iu tia problememo.

De Rikardo Ŝulco kaj la literaturesterila Analiza Skolo Lutermano ŝajne



heredis du ideojn: 1) ke por traduki beletron sufiĉas apliki simplisman surogaton de logiko, kaj 2) ke do eĉ komputilo kapablas esperantigi tekston el la germana per nura anstataŭiĝo de la vortoj, sklave konservante la sintakson de la originalo. Krom sistema esperantigo de ĉiuj nomoj de personoj kaj lokoj (kvankam la universaleco de Kafka certe pravigus lokon por Kafko en la nova PIV), aŭ konsterna plenumo da atismoj, abundas ĉiaj perloj de la arto fuŝtradi. Nur unu ekz-

emplo (p. 83): “La sinjoroj klinis sin super la antaŭ ilin metitajn pladojn, kvazaŭ volus ilin antaŭmange kontroli, kaj efektive distranĉis tiu, kiu sidis en la mezo kaj de la du aliaj ŝajnis rigardata aŭtoritato, pecon da viando ankoraŭ sur la plado, evidente por konstati, ĉu ĝi estas sufiĉe mola kaj ĉu ĝi eble ne resendotas kuirejen.” Kaj tiel sur cento da paĝoj! Por komparo, jen la responda parto ĉe Nervi (p. 64): “La sinjoroj kurbiĝis sur la alportitajn pladojn kvazaŭ ili volus kontroli ilin antaŭ la manĝo, kaj fakte tiu, kiu sidis meze kaj ŝajnis aŭtoritata al la aliaj du, eltranĉis pecon da viando ankoraŭ sur la plado, evidente por prijuĝi, ĉu ĝi estas sufiĉe mola aŭ ĉu oni devas resendi ĝin en la kuirejon.”

Bona traduko devas legiĝi kiel bona originalo, kaj jen la merito de Nervi: li prezentas al negermanlingvaj esperantistoj novelon en prozo senpere komprenebla, klara kaj preciza.

Ambaŭ versioj enhavas diversajn erarojn kiujn oni povintus elsarki per plia kontrollego. Des pli tio ĝenas en la tipografio tre plaĉa eldono de Edistudio. Jen listeto: *amplifikas* anst. *amplifas* (p.10); *mobelskua* anst. *mebloskua* (p. 29); *eksufokus* anst. *eksufokiĝus* (p. 50); *solemnaĵoj* anst. *solenajoj* (p. 61); *violonludadon* anst. *violonludado* (p. 66). Mi dubas ankaŭ pri *opozicio* (p. 70) kaj pri *burglernanto*, *popollernanto* (p. 54), al mi kabalaj. (Mi trovas pli kompreneblaj la solvojn de Lutermano, resp. “rezisto” kaj “mezlernejo”, ano de la elementa lernejo.”) Tri vortojn en la antaŭparolo de Nervi mi opinias glosindaj: *onirismo*, *izotopio*, *pulsio*.


Fine mi gratulu la Estraron de UEA, kiu prave elektis *La metamorfozo* de Kafka/Nervi por la renoma serio Oriento-Okcidento.

Jorge Camacho (Bruselo)

Por esti ĝisdata pri la evoluo kaj faka literaturo de interlingvistiko kaj esperantologio

INFORMILO
POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.



• Plurmedia KD-ROM preta

La kompakta disko *espeRom* de Stefan Fisahn kaj Tilman Meierfrankenfeld (vd. nov., p. 199) estas preta kaj dissendita kiel suplemento de la revuoj *Esperanto aktuell* kaj *GEJ Gazeto*. Taŭga same por germanaj interesatoj pri E-o kiel por e-istoj, la informplena plurmedia KD-ROM estas, laŭ esprimo de *Komputika leksikono*, propagaĵo (*shareware*), t.e. dum 30 tagoj senpage provebla, kaj nur por posta uzo necesas pagi 30 germanajn markojn al la aŭtoroj (Tilman Meierfrankenfeld, Pleistermühlenweg 109, DE-48155 Münster; ☎/☐+49/251/316-983).

• Revenas La Verko de la Jaro

Kooperativo de Literatura Foiro restarigis la premion La Verko de la Jaro por originalaj beletraĵoj, kiu estis atribuita sesfoje inter 1976 kaj 1987. Voĉdone atribuos la premion ĉiujare, alterne al poeziaj kaj prozaj verkoj, abonantoj de *Literatura Foiro*, al titoloj proponitaj de almenaŭ tri membroj de Esperanta PEN-Centro. La premiado okazos en Internacia Literatura Forumo, ĉiusomera aranĝo de LF-Koop. (*Literatura Foiro*)

• Penseo ne en penso

Post 16-monata paŭzo reaperis, kun verkoj de MAO Zifu, LU Jixin k.a., kvar ĉi-jaraj numeroj de la monata ĉina literatura revueto *Penseo*, plu sub la redakto de SHI Chengtai (Nan Jie 147, Heilongjiang, Tai Lai CN-162400), kiu atendas manuskriptojn. Nun la revuon eldonas Donghuo Esperanto-Domo (PENG Zhengming, Fujiapo, Meiyuan Xiaoqu, 301-3-2 Hubei, Wuhan, CN-430070; ☐dedhea@public.wh.hb.cn). Hejmpaĝo: <http://www.geocities.com/Tokyo/Flats/2394.ni>. Ĉiu interesato povas ricevi *Penseo* kontraŭ kelkaj respondkuponoj, sed donacoj por la eldonado bonvenas ĉe la UEA-konto "pzhm-a".

• Forumo batalas preter n-ro 100

La membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, *Forumo*,

festas siajn 20-jariĝon kaj 100-an numeron per ĉefartikolo de John Wells, prezidanto de LSG ekde la pasinta jaro. Kronologia retrorigardo memorigas ke en 1978 nia revuo *Esperanto* ankoraŭ malakceptis anoncon pri samseksamo. "Kvankam [la] situacio [de gejoj] multe pliboniĝis dum la pasintaj tridek jaroj" — skribas Wells, necesas plu batali por "forigi diskriminacion surbaze de seksa orientiĝo". La dumonata *Forumo* estas redaktata de Wolfgang Kirschstein (Hvedebjergvej 30, DK-8220 Brabrand, Danio) kaj rete atingeblas ĉe <http://www.esperanto.net/lsg/forumo/>.

La nova retgazeto *Esperanta Gejaro* estas konsultebla ĉe <http://www.magick.net/eg>.



Nürnberg, la trezorujo de Germanio
Deutschlands Schatzkästlein

• La plej frua — la plej historiema?

La plej frue (1888) fondita Esperanto-grupo de la mondo, tiu en Nurenbergo (Pirckheimerstr. 11, DE-90408 Nürnberg, Germanio) eldonas, seninterrompe de 1981, la ĉiujaran broŝuron *Rerigardo* pri sia agado. Jen imitinda maniero aktivigi klubanojn kontribuemajn, kaj elstara datum-banko por movad-historiistoj.

• Bazaro de spertoj

En senpaga provnumero de *Bazaro* (red. Julia 'Sigmond, C.P. 200, RO-3400 Cluj-Napoca, Rumanio) trideko da geesperantistoj el Rumanio rakontas pri siaj E-travivaĵoj en la jaro 1996, kongresaj, vojaĝaj kaj aliaj: interesa kalejdoskopio, kiu atestas pri la grava loko okupata de Esperanto en la indidua vivo de multaj.



• Ahtisaari: Rememoro en Bonaero

En marto la finna prezidento Martti Ahtisaari, ricevinto de Premio Zamenhof en 1995, oficiale vizitis Arĝentinon. Kiam li hazarde renkontis en Bonaero, dum malfermo de arta ekspozicio en la Nacia Belarta Muzeo, la konatan Cseh-instruiston Atilio Orellana Rojas, Ahtisaari volonte rememoris pri sia rolo kiel Alta Protektanto de la UK en Tampere (1995).

• Kasymova: Taĝika kultur-ambasadoro

Dum vojaĝo en Nederlando kaj Germanio, la 7-an de marto vizitis la Centran Oficejon Natalija Kasymova, 41-jara blinda instruistino el Duŝanbe, ĉefurbo de Taĝikio.

El ĉi tiu lando kun antaŭe vigla movado (kie ekz. oni eldonis la rusan-Esperantan vortaron de Bokarev), nun milit-plagita kaj tre malriĉa, la plej multaj e-istoj elmigris al Rusio, Germanio aŭ najbaraj landoj. Triopo de aktivuloj klopodas teni la nivelon: Firdaŭs Ŝukurov, Viktor Kiselev kaj Natalija Kasymova, kiu instruas unu infanan kaj unu parte blindulan grupon. E-lernemulojn en Taĝikio allogas la rakontoj pri vojaĝoj kaj kongresoj, la fakto ke e-istoj interesiĝas pri ilia lando. Tamen, korespondi estas por ili malfacile, ĉar afranko kostas tritagan averaĝan salajron.

La taĝikia registaro subvenciis la vojaĝojn de Kasymova al la UK-oj en Tampere kaj Prago, ĉar ŝi diskonigas la taĝikan kulturon — i.a. per sia ĵus aperinta sonkasedo *Kantas Natalija Kasymova* (vd. p. 95).

Laste aperis



Amerika skizlibro. Eroj el poeta viv-resumo. Petro Braŭn (1957). Edinburg (Usono): la aŭtoro, 1996. 59p. 21cm. 12,90 gld.

Atendoj rilate Eŭropon post komunismo. Tyburojusz Tyblewski (1933). Jelenia Góra: Libro, 1993. 20p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. 3,60 gld.

Beginner's Esperanto. Esperanto por komencantoj. Joseph F. Conroy (1946). New York: Hippocrene Books, 1994. 342p. ISBN 0 7818 0230 X. 22cm. 15-leciana, anglalingva meminstruilo el konata usona serio de lingvolerniloj. 30,00 gld.

Ĉifrado kaj ĝia rolo en la "nova komunikado"; Pri objektiveco en la scienco. Reinhard Fössmeier (1955). Jelenia Góra: Libro, 1993. 26+6p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. 5,40 gld.

Dhammapado aŭ la vojo al Nirvāno, La (1-a jc. a.K.). El la palia trad. T.T. Anuruddha (-1982). Seewald: Hermann Schröder, 1996 (2-a eld.). 77p. 21cm. La aŭtentaj instruoj de Budho. Kun abunda budhisma glosaro de la eldoninto. 9,90 gld.

Diccionario de bolsillo Esperanto-Español y Español-Esperanto. J. Paluzie-Borrell. Barcelona: Ramón Sopena, 1997 (reviziita eld.). 383p. ISBN 84 303 0148 8. 14cm. Poŝvortaro kun 25 000 vortoj. 13,50 gld.

Elektitaj konceptoj de prof. d-ro Ivo Lapenna. Birthe Lapenna (1935). Jelenia Góra: Libro, 1993. 12p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. Fragmentoj el paroladoj. 3,60 gld.

El la historio de rusa pentra arto. Nina Korjenevskaja (1949). Jelenia Góra: Libro, 1993. 22p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. De ikonoj ĝis Maleviĉ. 3,60 gld.

Enkonduko en la arton skribi. Stefan Maul (1940). Jelenia Góra: Libro, 1993. 17p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. 3,60 gld.

Enkonduko en la filozofian pensadon. Vinko Ošlak (1947). Jelenia Góra: Libro, 1996. 23p. ISBN 83 86324 25 2. 21cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 5/1996. 3,60 gld.

Esperanto preter la jaro 2000. (Temoj por publika informado pri Esperanto). Gian Carlo Fighiera (1929). [Venaria Reale: la aŭtoro,] 1995. 57p. 30cm. Raporto al la 2-a Esperanta Eŭrop-unia Kongreso, Parizo, 1995. 15,00 gld.

Gesta d'Utnoa, La. Abel Montagut (1953). El Esperanto en la katalunan trad. la aŭtoro. Lleida: Pagès, 1996. 215p. ISBN 84 7935 384 8. 22cm. La scienc-fikcia epopeo *Poemo de Utnoa* en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

19,80 gld.

Idento kaj komunikado (subekzemple de la minoritata problemaro en la suda Karintio en Aŭstrio). Vinko Ošlak (1947). Jelenia Góra: Libro, 1993. 21p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. 3,60 gld.

Interkompreniĝi, sed kiel? Raporto pri internacia lerneja enketo rilate la lingvan komunikadon kun alilandanoj. Elisabeta Vilisics-Formaggio (1934). Jelenia Góra: Libro, 1993. 16p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. 3,60 gld.



Reaperis la plej uzata vortaro de la hispanlingva esperantistaro.

Interparolo en la frukt-ĝardeno la 5-an de aŭgusto (1978). Igor Newerly (1903-87). El la pola trad. Zofia Banet-Fornalowa. Varsovio: la tradukinto, 1997. 67p. 20cm. Imagita dialogo inter skoltaj kaj la aŭtoro, kiu estis amiko kaj kunlaboranto de Janusz Korczak, pola edukisto mortigita en koncentrejo kun la infanoj kiujn li prizorgis. 10,50 gld.

Komunaj leksikaj elementoj en Esperanto kaj rumana lingvo. Maria Butan (1946). Jelenia Góra: Libro, 1993. 23p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. Statistika subteno de la tezo ke la rumana estas la latinida lingvo plej proksima al Esperanto. 3,60 gld.

Koreaj malnovaj rakontoj. Kompilis kaj el la korea trad. Sung Ho Cho. Seulo: Korea E-Asocio, 1997. 96p. ISBN 89 87281 00 0. 23cm. Abunde ilustrita. Kvin popularaj rakontoj morale instruaj. 15,00 gld.

Lasta floro, La (1939). James Thurber (1894-1961). El la angla trad. Liland B. Ros'. Berkeley: Bero, 1996. 31p. 18cm. Bild-rakonteto pri ĉiama milito kaj ĉiama re-menco. 4,80 gld.

L.L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj. Okaze de la 80a datreveno de lia morto. André Cherpillod (1930). Courgenard: La aŭtoro, 1997. 31p. ISBN 2 906134 40 6. 21cm. Viv-kronologio, pseŭdonimaro kaj horoskopo de Zamenhof. 10,50 gld.

1100 jaroj en Eŭropo. Milcentjara datreveno de landkonkero 1996. Péter Dérzi. El la hungara trad. Ervin Fenyvesi. Budapest: Sekretariato de Memorkomisiono, 1996. 12 (nenumeritaj) p. ISBN 963 8155 45 0. 24cm. Koloraj fotoj. Pri grava datreveno en la hungara historio. 3,00 gld.

Monumente pri Esperanto. Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj. Hugo Röllinger (1905). Red. Thomas Bormann. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1997. 111p. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. 18,00 gld.

Nuo Babelio iki Esperanto. Petras Čeliauskas (1929). Vilnius: Vytyrys, 1989. 227p. ISBN 5 7900 0180 7. 17cm. En la litova. Ilus. Bind. Popularscienca prezento pri la evoluo de lingvoj kaj skriboj, kun ampleksa pritrakto de Esperanto. 18,00 gld.

Sesa regulo, La (1990). Rikardo Ŝulco (1906). Jelenia Góra: Libro, 1993 (2-a eld.). 100p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. Frazanaliza studo pri -ata/-ita, plus ekzercoj. 14,40 gld.

Tibeta evangelio aŭ "La ne-konata vivo de Jesuo-Kristo" (1894). Nikolas Notoviĉ. El la franca trad. Hermann Schröder. Seewald: la tradukinto, 1997. 35p. 20cm. "La kaŝita vivo" de Jesuo inter lia 13. kaj 30. vivjaroj: li estis reenkarigiinta Budho. 7,50 gld.

Vojoj kaj formoj de penetrado de la franca leksiko en la rumanan lingvon. Maria Butan (1946). Akademia Libroservo, 1996. 40p. ISBN 83 86324 25 2. 21cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 5/1996. Ĉapitroj el doktoriga disertacio. 7,20 gld.

DIVERSAĴOJ

Afiŝoj: Patrino mi amas eterne. Iraĝ Mirza. Ilustris Bahram Ĥaef. El la persa trad. Maryam Nezami. Tehran: Atai, 1995. 35x25cm. Trilingva: persa-angla-Esperanta. Unu poemo sur ses artismaj afiŝoj, kun ŝirmkovrilo. 36,00 gld.

Sonkasedo: Kantas Natalija Kasymova. Dušanbe, 1997 (neindikita). 54 min. Trad. F. Ŝukurov, Laŭlum k.a. Ok taĝikaj kaj sep aliaj kantoj, kun sintezila akompano. 19,80 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA. Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldona valoro imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Sezonoj floras en ĉiuj sezonoj

Post tro longa paŭzo reaperas ĉi tiu rubriko, kiu en 1993-95 naŭfoje prezentis diversajn Esperanto-revuojn. De nun, komencante per Sezonoj (Ruslando), ni vizitos kaj redakciojn kaj eldonejojn.

Un printempan vesperon de 1991, en la Centra Oficejo aperis du viroj kaj juna virino kun valizoj, kiuj enhavis centon de la Ĉeĥova novelaro *Sveda alumeto*, freŝege aperinta ĉe nova ruslanda eldonejo, Sezonoj en Jekaterinburgo (tiudate Sverdlovsk). Malmultaj kuraĝus tiam antaŭvidi ke nur ses jarojn poste la katalogo de Sezonoj listigos jam tridekon da propraj eldonaĵoj — kaj ke la “virino kun valizoj”, Halina Gorecka, faros en 1997 “retan viziton” al la CO.

Vin ni demandu pri Sezonoj.

Ja konsilinde, ĉar en via enkonduko regas eta kaoso pri nia eldon-agado. **Kiel do...?**

Unue, Sezonoj debutis ne en 1991. Sub tiu marko aperis kelkaj samizdataj [preterleĝe eldonitaj — Red.] volumetoj jam meze de la 80-aj jaroj, post kiam nia jarkvarona almanako *Sezonoj* montriĝis tro malvasta. Kelkaj niaj eldonaĵoj trovis vojon eksterlanden kaj ĝuis bonan akcepton. Due, nia eldon-agado ampleksas ne nur Sezonojn.

Ekde tiuj samizdataĵoj longas kaj imponas la vojo ĝis viaj lastatempaj grandaj volumoj.

Feliĉe, la E-literaturaj konoj de Aleksander Korĵenkov (dum jardeko aktiva samizdate) trovis kuraĝigon kaj apogon de Viktoro Kloĉkov, kiu fine de la Gorbaĉova erao iĝis unu el la plej sukcesaj eldonistoj en Uralo. Pro lia helpo ni ne devis tuj investi multan monon por aĉeti komputilojn k.s., kaj ni decidis lasi la malnovan ŝildon de Sezonoj por la nova entrepreno.

Kiuj estas “ni”?

Krom ili du, konstantan engaĝon havis nur mi per provlegado, ekspedo, reklamado kaj librotenado. Kaj hodiaŭ, pro tempokonsuma politika aktivado de Viktoro, restis nur Aleksander kaj mi, koincide samfamilianoj. Kompreneble, helpas aliaj: Viktoro Kulakov kaj Sergio Pokrovskij asistas pri komputilaj problemoj, Osmo Bulter donis valorajn konsilojn pri eldonpolitiko, kaj — kompreneble — kunlaboras niaj aŭtoroj.

Vi diris ke via eldon-agado signifas ne nur Sezonojn.

En 1994 ni trovis utila dividi la laboron (ankaŭ pro financaj kaŭzoj). De tiam Sezonoj prizorgas nur la pli gravajn projektojn, dum la broŝurojn transprenis *Ruslanda Esperantisto* — gazeto kiun restarigis en 1991 konferenco de uralaj esperantistoj, kaj kies eldonadon post tri jaroj Ruslanda E-Asocio transdonis al mi.

Kiel aspektas viaj eldon-prioritatoj?

Nature, ni komencis per rusa beletro. Elektitaj laŭ rigoraj kriterioj, ĝis nun aperis, krom *Sveda alumeto*, *La unua amo* de Turgenev, *Princidino Mary de Lermontov*, *La majstro kaj Margarita* de Bulgakov kaj *Krimo kaj puno* de Dostojevskij.



Halina Gorecka

Post *La majstro*, ni ricevis eldonproponojn ankaŭ el aliaj landoj. Tial estis lanĉita la serio Mondliteraturo, kun ĝis nun kvar titoloj, inkluzive de nia plej dika libro, la 544-paĝa *La Kunularo de l' Ringo*, la unua el la tri volumegoj de *La Mastro de l' Ringoj* de J. R. R. Tolkien en la brila traduko de William Auld. Jam kvar tradukojn de Auld ni eldonis, kaj tio ne estas punkto. Ni tre alte taksas ankaŭ la bonvolan rilaton de Harry Harrison, de kiu jam du libroj enmondiĝis en Jekaterinburgo.

Ĉu vi ne opinias ke la Esperanta merkato estas superinundita?

Ĉiujare pli ol 100 eldonejoj/eldonistoj produktas en E-o. Pluraj el ili estas entuziasmuloj kun iom da mono, por kiuj ne gravas malrapida vendado. Sed por nia familia buĝeto la ĉefa enspezo estas E-libroeldonado, kaj aperigi ion nevendeblan finance ruinigus nin. Malgraŭ tio, ni konscie eldonis kelkajn “malprofitigajn” librojn, ekz. la poemaron *Kvarteto*.

Eble ne-beleto ekvilibrigas vian buĝeton.

Ĉiuj scias ke lernolibroj kaj vortaroj pli vendiĝas ol beleto. Tamen ni eldonas ne nur la plej legatan esperantistan aŭtoron, kiu sendube restas Zamenhof. Alia “atuto” apud Tolkien estas nepre *Komputika leksikono* de Sergio Pokrovskij. Laŭ fakuloj nur en malmultaj lingvoj ekzistas tiel kompetenta kaj ĝisdata verko; aktualigita reeldono sekvos post unu jaro.

Ĉu ion pri viaj eldon-kvantoj?

Ni eldonas inter 200 kaj 1000. Kuintime ni sukcesas produkti laŭ la bezono: elĉerpiĝis *Kunularo* kaj — agrabla surprizo por eldoninto de faka verko! — *Komputika leksikono*. Kelkfoje ni eraris: vendiĝis nur iom pli ol duono el la 200 *Historiaj studoj* de Drezen, malgraŭ nealta prezo.

Ne ekzistas eldonejo sen planoj.

William Auld ĵus heroe fintradukis la lastan volumon de *La Mastro de l' Ringoj*: ni ŝatus ke *La reveno de la Reĝo* aperu jam en Adelajdo. Poste la skota majstro regalos nin per aventuroj de Ŝerloko Holms, kaj poste eble per tiuj de Pikviko. Atendas sian vicon *Morto de Ivan Iljiĉ* (Tolstoj), *Historio de Esperanto* (Korĵenkov), E-lernolibro por udmurtoj, kelkaj lerniloj por rusoj. Poste venos poemaro de Brodskij, *Malgrandaj tragedioj* de Puŝkin, *Reviviĝo* de Tolstoj...

Kompreneble, ni ne forgesas nian gazetan fakon. La pli konata el niaj du periodaĵoj estas *Ruslanda Esperantisto*. Sed lastatempe akiras popularecon alia feniksa gazeto — *La Ondo de Esperanto*, restarigita same antaŭ ses jaroj. Eldoni du gazetojn estas malfacile por ni, kaj eble baldaŭ ni havos nur unu, sed tio komencus alian temon — nu, eble alifoje.

Adreso: “Sezonoj”, p.k. 162, RU-620014 Jekaterinburg, Rusio; ☎+7/3432/224-501, 235-785; ✉hrgrgo@sbank.e-burg.su. ★

Titoloj de eldonejo Sezonoj ĉe la Libroservo de UEA

Du turegoj, La. J.R.R. Tolkien. El la angla trad. William Auld. 1996. 429p. 21cm. Bind. Dua parto de la epopeca rakonto "La Mastro de l'Ringo". 42,00 gld.

Historiaj studoj. Ernest Drezen. 1992. 167p. 20cm. *Analiza historio de esperanto-movado* (1931), *Zamenhof* (1929) kaj *En batalo por SEU* (1932). 18,00 gld.

Kojonov Luĉjo. Rusa erotika poemo. Trad. Valentin Melnikov. 1995. 19p. 21cm. Longtempe malpermesita poemo pri amorema vidvino. 3,00 gld.

Krimo kaj puno. Fjodor Dostojevskij. El la rusa trad. A. Parfentjev. 1993. 485p. 20cm. Bind. Unu el la plej famaj romanoj de la mondo. 48,00 gld.

Kvarteto. V. Ĉaldajev, G. Gazizi, N. Lozgaĉev, A. Kris. 1996. 78p. 20cm. Internacia prezentiĝo de tri rusaj kaj unu baŝkira poetoj. 12,00 gld.

Lingvaj respondoj. L.L. Zamenhof. 1992. 55p. 20cm. 9,00 gld.

Ljusjka Benc. Viktor Sapoĵnikov. 1992. 74p. 21cm. Noveloj kaj humuraĵoj kolektitaj el la almanako *Sezonoj*. 12,00 gld.

Majstro kaj Margarita, La. Miĥail A. Bulgakov. El la rusa trad. Sergio Pokrovskij. 1991. 374p. 21cm. Bind. Moderna klasikaĵo, samtempe romano pri la Moskvo de la 30-aj jaroj, apokrifa evangelio el la antikva Jerusalemo kaj rakonto pri balo ĉe Satano. 36,00 gld.

Malica komizo, La. Wladislao Fernández-Flórez. El la hispana trad. Fernando de Diego. 1993. 166p. 20cm. Bind. Humura romano kies intrigon fonas la ekonomia krizo de la 30-aj jaroj. 15,00 gld.

Marksismo kaj lingvoscienco (1950). Iosif V. Stalin. Antaŭparolo de U. Lins. El la rusa trad. Aleksander Korĵenkov. 1992. 43p. 20cm. 9,00 gld.

Metropoliteno (1933). Vladimir Varankin. 1992 (3-a eld.). 264p. 20cm. Bind. Klasika, parte aŭtobiografia romano pri Moskvo kaj Berlino en 1928-29. 24,00 gld.

Naskiĝo de la rustimuna ŝtalarato (1985). Harry Harrison. El la angla trad. pluraj. 1996. 222p. 21cm. Bind. Kiel Jim diGriz, posta heroo de fascinaj sciencfikciaj aventuroj, komencis sian krimkarieron. 24,00 gld.

Spartako. James Leslie Mitchell. El la angla trad. William Auld. 1993. 224p. 20cm. Bind. Historia romano pri la sklavribelo de Spartako. 24,00 gld.

Sveda alumeto. Anton P. Ĉeĥov. El la rusa trad. A. Korĵenkov k.a. 1991. 139p. 20cm. Noveletoj, kiuj formas "impresionistan" bildon de la pasintjarcenta rusa socio. 21,00 gld.



• Argentino: Populara Patagonio

La unua internacia Esperanto-semajno (14-21 dec.) en Bariloche, populara ripoz-loko patagonia pri kies E-movado ni raportis pasintjare (jul.-aŭg., p. 138), pasis des pli sukcese ke ĉeestis e-isto CHENG Bao Kuan el Harbin (Manĉurio, Ĉinio), majstro de ĉinaj lukt-artoj. (*Antaŭen – ĵuacia adelante!*).

• Bosnio: Kuraĝigu kursanojn

13 lernejoj 14-jaraj partoprenis dum unu monato, proksime al Goraŝde, E-kurson estratan de la franca instruistino Nicole Rizzoni. Sendu kuraĝigajn leterojn al: Ŝkola osnovna BARE, oŝ "Fadil Fako Ĵozo", BA-73000 Goraŝde, Bosnio kaj Hercegovino. (*SAT-Amikaro, Laŭte!*)

• Britio: Pacmesaĝo el Kimrio

Antaŭ 75 jaroj pastro Gwilym Davies, unu el la fondintoj de Ligo de Nacioj, lanĉis la unuan "Mesaĝon de Paco kaj Bonvolo", kiun ĉiujare dissendas Urdd Gobaith Cymru, la junulara movado de Kimrio, en 9 lingvoj, i.a. en Esperanto. (✉urdd@urdd.demon.co.uk)

• Brazilo: Aplaudinda aprobo

En Ipameri (ŝtato Goiás), post kvar vaste reklamataj prelegoj de Juscelina Gama, kiujn ĉeestis ĉ. 350 personoj, la direktorino de la loka Agrokultura Lernejo tute aprobis la ideon oficiale enkonduki E-on. Pluraj lernantoj ekstudis la lingvon pere de komputila kurso. En la lerneja biblioteko starigis E-sekcio, kies kresko dependas de ĉies donacemo. Gratulletoj al la lernejgvidantoj bonvenas: Rua Dona Branca de Aguiar Machado 65, Centro, BR-75820-000 Ipameri – GO, Brazilo. (*Eventoj*)

• Francio: LingvoFesto ekspansias

La multlingva, distre kleriga aranĝo LinguaFest' en Tours (nov. '96, p. 196) estis ĉi-jare vizitata de duoble pli da personoj ol en 1996. Nombriĝis 250 fulmokusoj, 85 lingvoj kaj entute 400 lingvaj aktivaĵoj. Raportis pluraj naciaj televido kaj radioj, kaj kelkaj menciis ankaŭ Esperanton: pere de la kanalo TF1 ĉ. 10 milionoj da spektantoj povis aŭdi Esperantajn vortojn. (D. Keefe)

• Hungario: Ree en festivalo

Kadre de la Budapeŝta Printempa Festivalo la 22-an de marto denove okazis, jardekon post la popularaj Teatraj Festivaloj (1983-87), E-lingva kultura programo organizita de Hungaria E-Asocio kaj prezentita de gesperantistoj el Hungario kaj Rumanio. (O. Princz)

Jung. Aktiv. International.



Land und Leute erleben. Weltweit ohne Sprachbarrieren. Der erste Schritt ...

Esperanto die internationale Sprache

• Germanio: La ĝusta trajno

La informilo "Via vojaĝplano", kuŝanta en trajnoj, estas unu el la plej legataj flugfolioj de Germanio. Ĝi enhavas – krom la horaro, trajnŝanĝoj k.s. – multajn reklamojn. Germana E-Ligo eksperimente enmetigis anoncon, kiun vi parte vidas ĉi-supre, en la informfoliojn de la trajnoj Berlino-Munkeno (marte), Bazelo-Dresdeno (aprile) kaj Munkeno-Kiel (maje). (*GEJ-Gazeto*)

• Hispanio: Reĝina prezido

Sofia, la reĝino de Hispanio, akceptis la honoran prezidantecon de la 7-a Internacia E-Kongreso (Valencio, 8-13 julio). (A. Casquero)

• Italio: Vitrala omaĝo

Fine de oktobro 1996 estis inaŭgurita en preĝejo de Rimini rozvitralo de geartistoj Ivonne Ioli kaj Mannino Elli, kiu havas italan kaj Esperantan surskribojn. La paroĥestro Duilio Magnani, prezidinto de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista, volis memori per la artaĵo du eventojn: la starigon de normoj por celebradoj de mesoj en Esperanto (1990) kaj ĝian ekuzon en la paskaj salutoj de la papo (1994). (*Katolika Sento*)

• Kroatio: KEU ĉe infanfoiro

En la 1-a Internacia Infana Foiro (19-23 marto, Zagrebo) reprezentigis ankaŭ Kroata E-ista Unuiĝo per internacia ekspozicio de infandegnaĵoj, infanlibroj kaj kultura programo en E-o. (M. Belošević)

• Slovakio:

Prezidenta invito al skoltaj

La reprezentanto de Skolta E-Ligo en Slovakio, Miroslav Havráněk, sendis nome de Skolta E-Ligo Slovakia

(SELSLO) la originalon kaj slovaklingvan tradukon de la Manifesto de Prago al Michal Kováč, prezidento de Slovakio. Responde, la prezidento invitis SELSLO-anojn al sia rezidejo, kie la 23-an de novembro ili estis akceptitaj de kanceliero Ján Findra kaj de Milan Zemko, direktoro de la fako pri interna politiko. Dek tri skoltaj geknaboj kun siaj tri studentaj estroj prezentis diversnaciajn kantojn en Esperanto. La kanceliero alte taksis la unuigon de la skolta kaj Esperanta ideoj en la aktivado de infana eduk-organizo. (*Esperantisto Slovaka*)

• Svedio:

Radio kreskigis intereson

La intereso pri Esperanto post 5 radio-programoj en la sveda ŝtata edukradio (marto, p. 58) notinde kreskis. Multaj mendis la kajeron verkitan akompane al la programoj. Kelkaj gimnazioj planas startigi kursojn, kaj studentoj ĉe la Ekonomia Fakto de la Universitato de Umeå aranĝos studtagon en aŭtuno. La nova kursejo en Lesjöfors gastigos la 12-an Internacian Someran Kurson (8-20 junio), kunlabore kun Karlskoga Popola Altlernejo, kaj seminarion de Sveda E-Instituto (20-21 sep.). (L. Forsman)

• Arto: Verne en Esperanto

Arta instalaĵo de Klaus Bru, *Tiefenrausch* ("La ravo de l' profundo"), estas spertebla komence de majo en Berlina galerio. La vizitantoj, ekipitaj per skafandro kaj submaraj okulvitroj, povis esplori kvazaŭan margrundon, aŭdante strangan muzikon kaj Esperantlingvajn partojn el la romano "20 000 leŭgoj sub la maro" de Jules Verne. Laŭ peto de la artisto, la fragmentoj estis tradukitaj de kelkaj Berlinaj e-istoj, ĉar ne ekzistas esperantigo de ĉi tiu (kaj de preskaŭ ĉiuj) verkoj de Verne. (*Berlina Informilo*)

• Asekurado: Terminoj komentotaj

Marc Vanden Bempt (Rulenslaan 10, BE-3020 Herent, Belgio) kompilis 1250-eran terminaron pri asekurado en la lingvoj angla, Esperanta, franca, germana, hungara kaj nederlanda. Li serĉas kompetentulojn por kontrollegi kaj komenti la terminojn en la angla, franca kaj hungara.

• Biciklado: Post deklivo supren

Biciklista E-ista Movado Internacia (BEMI) estas unu el la du fakaj sekcioj de TEJO. (La alia estas EUKOKA.) Post malvigligo sekvinta la lastan grandan karavanon en 1991 al la IJK en Karlskoga, BEMI nun reorganiziĝas kaj per-rete relanĉis sian organon, redaktatan de Harro von Blottnitz. BEMI preparas tri karavanojn: ĉi-jare de Zagrebo al la IJK en Assisi kaj tra tuta Aŭstralio post la UK; en 1998 de Krasnojarsk (Siberio) al la IJK en Ĉinio. Kontakto BEMI ĉe la sekretario: Ivo Miesen, Drenckgaard 72C, NL-6227 GE Maastricht, Nederlando; ☎+31/43/361-69-40.

• Eŭropa agado:

Demando al la Komisiono

Sekve de kunveno en februaro ĉe la E-Asocio en Florenco, la itala eŭrodeputito Riccardo Nencini prezentis la 19-an de marto skriban demandon al la Eŭropa Komisiono pri "Komuna lingvo por Eŭropo": "... konsiderinte



• Japanio: De Verda Majo al nova rondo

En marto 1995 teatra grupo de altlernejo en Nagahama (apud la lago Biŭa, bildigita supre el *Albumo de japanaj vidaĵoj kaj moroj*, 1914) prezentis japanlingve teatraĵon "Mia fratino Teru", pri la japana esperantistino HASEGAŬA Teru (Verda Majo), batalinta dum la dua mondmilito en Ĉinio kontraŭ japana militismo. Laŭ tiu instigo, ekde novembro 1995 daŭris unujara Esperanto-kurso, kiun kronis fondiĝo, okaze de la pasintjara Zamenhof-festo, de Nagahama Esperanto-Rondo. La Rondo nun havas eĉ propran organon diversteman, *Laga sono*, redaktatan de ONO Tadahito (Higasi-mononobe 859, Takatuki-mati, Ika-gun, Siga, 529-02, Japanio).

• **Informado:**
Kiu estas kiu?

La 21-an de feb. la juna franca aktivulo Philippe Bérizzi estis invitito de la populara elsendo *Qui est qui?* ("Kiu estas kiu?") de la televid-kanalo France 2. La ludantoj divenas kiu el la invititoj kompetentas pri kiu el la anoncitaj fakoj. Bérizzi konvinke rolis kiel pseŭdoheraldikisto, sed post malkovro de lia identeco li ja povis saluti la spektantojn en E-o. Jen li, fotita de televida ekrano. Laŭ la privata kompanio kiu vendas tiun programon al France 2, tiu elsendo estas vidata de tri milionoj da spektantoj.



ke la adopto de komuna idiomo pli faciligus la naskiĝon de pli kohere kunteniĝanta Eŭropo, ĉu la Komisiono ne opinias ke ĝi devas alpreni iniciaton ĉe la statoj-membroj direktitan al atingo de tiu celo?" (U. Broccatelli)

La 15-an de decembro stariĝis en Bruselo studgrupo, konsistanta el sociologo Peter Forster (prezidanto), zoologo Wim de Smet kaj psikoterapiisto Claude Piron, por "ellabori, sendepende de la ekzistantaj E-organizaĵoj, opiniojn diskonigotajn . . . por helpi al konsciigo, en la 21-a jarcento, rilate la lingvan komunikproblemon kaj la eblan rolon de E-o por ĝin solvi." Ekzistas jam Laborgrupo pri la lingva problemo en Eŭropa Unio, same sendependa, kiu celas similan konsciigadon en la politikaj sferoj de EU.

• **Medicino: Homeopatia ligo**

Fondita de d-ro Raja Iftikhar Ahmed Khan, medicina delegito, Pakistana Homeopatia Esperanta Ligo (P.O.B. 37, District & Tehsil, PK-49600 Jhelum, Pakistano) serĉas kontakton kun esperantistaj homeopatoj.

• **Muzeoj: Festo kaj fondo**

Por danki la senlakan laboron de muzeestro Luis Hernández Yzal, la 17-an de junio oni festos la tagon de Hispana E-Muzeo (Doctor Zamenhof 12, ES-08739 St. Pau d'Ordal). Ekde nun la festo reokazos ĉiam la trian dimanĉon de junio. (*Boletín*)

En la Donghu-a Esperanta Domo (vd. feb., p. 26), situanta ĉe pitoreska lago apud Wuhan (la ĉefurbo de la provinco

Hubei) fondiĝis la unua E-muzeo en Ĉinio, kun ses ĉambroj kaj du haloj (230 m²). Vizitu la domon kaj sendu esperantaĵojn al la muzeo: p/a PENG Zhengmin, Fujiapo, Meiyuan Xiaogu, 301-3-2 Hubei, Wuhan, CN-430070; dedhea@public.wh.hb.cn. (Peng Z.)

• **Sindikatoj: Sekcioj uzu E-on**

En sia 20-a kongreso (Madrido, dec. 1996), Internacia Laborista Asocio (AIT) instigis siajn sekciojn propagandi E-on kaj uzadi ĝin inter si. En sia organo la hispana sekcio CNT aperigis la unuan paĝon de E-kurso en februaro. (*Laŭte!*)

• **Universitatoj:**
Aix mortis, vivu Marsejlo

En la Universitato de Provenco Aix-Marseille I, Sekcio Sciencoj (Marsejlo, Francio) malfermiĝis 13-semajna, pothora kurso de Michel Challulau pri interlingvistiko kaj Esperanto, kiel unu el la 20 fakoj inter kiuj studentoj de la unua studociklo devas elekti. Tiu nova kurso iomete kompensas la fermon (dec., p. 216) de la Esperanto-fako en Aix-en-Provence. (R. Triolle, *Franca Esperantisto*)

• **ZEO-j: Ĉu la 1045-a?**

La listo de Zamenhof/Esperanto-objektoj en la mondo ne kompletigis per la 1044 ZEO-j listigitaj en la freŝa libro *Monumente pri Esperanto* (vd. p. 92). La 15-an de junio oni jam inaŭguros novan straton Zamenhof en la franca Gravelines (12 650 loĝantoj), je 21 km-oj de Dunkerque kaj 86 km-oj de Lille. (*Esperanto – Ile de France*)

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Brazilo: José Fernando Valim.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTO (minimumo 25 USD):
Usono: R. Paul Lynch.

PATRONOJ DE TEJO 1997

Belgio: Elvira de Coene. Brazilo: Marija Pozder Almada. Francio: Paul Coulot. Japanio: Joel Brozovsky. Usono: R. Paul Lynch.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Brazilo: Marija Pozder Almada. Finnlando: Irma Heikkilä. Francio: Jean Amoureux; Jean Gibaux; Maurice Sujet; Paul Coulot. Italio: Maria Teresa Malatesta. Japanio: Akira Morita. Kanado: Marijke Meijer. Korea Resp.: LEE Chong-Yeong; Wonsik Kim. Nederlando: Ru H. Bossong. Slovenio: Jožica Židanik. Svedio: Inga-Maj Lindkvist; Olle Olsson. Usono: R. Paul Lynch.

DONACOJ 1997 (NLG)

ĝis la 31-a de marto

Asocia Kapitalo: Belgio: memore al Árpád Lödör 10 839,00.

Fondaĵo Afriko: Anonime: 3800,00. Kanado: M. McCall 26,41. Italio: D. Trombetta 2397,00. Sumo ĉi-jara 6223,41.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: T. Sormunen 100,00. Sumo ĉi-jara 233,00.

Fondaĵo Azio: Japanio: J. Brozovsky 31,04; T. Tadaisi 31,04; N. Takahasi 62,08; T. Unoki 46,56. Sumo ĉi-jara 1497,84.

Fondaĵo Canuto: Francio: J.-F. Clet 66,40; R. Cuenot 33,20; A. Tailpied 33,20. Usono: J. Amis 19,22. Sumo ĉi-jara 2264,58.

Ĝenerala Kaso: Usono: R. Spaulding 3,80. Sumo ĉi-jara 1409,58.

Kampanjo 2000: Japanio: ETSUO Miyoshi 17 994,64. Korea Resp.: LEE Chong-Yeong 3758,90. Sumo ĉi-jara 21 753,54.

Konto Espero: Francio: R. Cuenot 33,20; R. Deneu 33,20; R. Hardy 13,28; A. Tailpied 33,20. Nederlando: J.S. Douma 100,00. Usono: J. Amis 19,21. Sumo ĉi-jara 2164,26.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Anonime: 189,00. Sumo ĉi-jara 189,00.

Junulara Fondaĵo: Francio: E. Svane 63,39. Nederlando: B.A. Cost Budde 100,00. Sumo ĉi-jara 163,39.

Volontula Fondaĵo: Norvegio: E. Gjessing 20,00. Sumo ĉi-jara 330,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

C.H. DHARMATILAKE (1917-1997), dumviva membro, 35 jarojn delegito en la ĉefurbo de Srilanko, Colombo, forpasis komence de marto. Aktiva instruisto, li verkis sinhalan ŝlosilon kaj tradukis sanskritajn fabelojn.



Leopold GRIMME (1903-1997) forpasis la 6-an de januaro en Vieno. Lia esperantista viv-partnerino Maria Zajicek mortis naŭ tagojn

poste. Grimme fondis post 1918 en Döbling lokan grupon de Aŭstria Laborista Ligo E-ista, kaj baldaŭ iĝis estrano de ALLE. En la redaktado de ties revuo, *La Socialisto*, li kunlaboris kun Franz Jonas, ALLE-sekretario kaj posta (1965-74) aŭstra ŝtatprezidanto. Post la malpermeso de ALLE, Grimme aliĝis en 1935 al Aŭstria E-ista Federacio kaj dum multaj jaroj servis kiel ties vicprezidanto. Li gvidis la LKK-n de la 55-a UK (Vieno, 1970).

Hugo KRAUS (1914-1996), honora membro de Aŭstria E-ista Federacio (AEF), mortis la 3-an de decembro en Andorf. Eklerninte Esperanton en 1934 je instigo de Ludwig Schödl (vd. ĉi-sekve), aŭtodidakte, li laboris kun Hugo Steiner ok monatojn preparante la Vianan UK (1936). Kun sia frato Walter li formis en 1935 e-istan grupon en la kontraŭfaŝista rezistomovado, pro kio ili estis malliberigitaj tutan jaron en 1936-37. Aliĝinte en 1946 al AEF, li baldaŭ iĝis ties afergvida estro kaj en 1950 vicprezidanto. Li redaktis (1950-51, 1971-85) la AEF-organon *Aŭstria Esperanto-Revuo* kaj instruis E-on en vespera lernejo Viena. Ekde 1961 Kraus kunlaboris kun la internacia E-kampadejo Primošten en Dalmatio, pri kiu li verkis la bildlibron *Feliĉigaj ferioj* (1963). Li membris en la LKK de la Viena UK (1970).

Tove MADSEN (1912-1997), preskaŭ 50 jarojn membro de UEA, delegitino en Odder (Danio) ekde 1952, mortis la 10-an de marto.

Tadeusz J. MICHALSKI (1933-1997), profesoro de la Varsovia Universitato, forpasis la 4-an de februaro. Esperantisto de duonjarcento, vicdelegito de Varsovio fine de la 50-aj jaroj, li aŭtoris la Esperanta-polajn poŝvortaron (1959, 1967, 1990) kaj grandan vortaron (1991).

Ludwig SCHÖDL (1909-1997) forpasis la 20-an de februaro en Neuruppin (Germanio). Elstara aktivulo de la laborista E-movado germana kaj internacia en la 20-aj kaj 30-aj jaroj, post la milito li forte porbatalis kaj influis la restarigon de E-movado en Germana Demokratia Respubliko, kaj fariĝis unu el ties ĉefaj aktivuloj. Li aktivis por la disvastigo de E-o inter infanoj, multe verkis — i.a. la unuan E-lernolibron eldonitan en GDR ĉe ŝtata eldonejo (*Wir lernen Esperanto sprechen*, 1967), korespondajn kURSOjn kaj kantarOjn —, abunde tradukis kaj brile prelegadis.

Krišs SMILGA (1910-1995) mortis la 25-an de novembro 1995 en Toronto (Kanado). Lerninte Esperanton en sia hejmlando Latvio en 1923, li elmigris post la dua mondmilito al Kanado,

kie li helpis refondi Kanadan E-Asocion en 1958. Li estis ties unua vicprezidanto, prezidanto (1969), kaj redaktoro (1964-72) de ties gazeto *Lumo*. UEA-membro dum duona jarcento kaj delegito de 1949, li longe servis kiel loka delegito en Toronto (1951-1987).

František ŠATURA (1921-1996) mortis la 14-an de januaro 1996 en Bratislava (Slovakio), kie li plurajn jarojn gvidis la E-klubon kaj instruis la lingvon. Doktoro pri filologio, li kunaŭtoris E-lernolibron aperintan en pli ol 20 mil ekzempleroj (1965, 1969).

Per TÖRNEGREN (1927-1997), dumviva membro, delegito dum kvaronjarcento pri konstruado kaj laborjuro, mortis la 4-an de januaro en Malmö (Svedio).

Jacqueline TRÉSORIER forpasis la 30-an de decembro 1996. De pli ol 50 jaroj esperantistino kaj UEA-membro, 25 jarojn vicdelegito kaj delegito en Nevers (Francio), ŝi esperantistigis ankaŭ siajn gefilojn: ŝia filo Claude estas delegito en Göttingen (Germanio).

ANONCETOJ

Eventoj, spiralbinditaj jarkolektoj, 1992-96, nur kelkaj ekzempleroj! 40 NLG/jaro. Redakcio: pk. 87, HU-1675 Budapeŝt, Hungario.

Korespondi deziras kun gejunuloj 20-jara studento. Ait Bouselham Mohamed, 7 rue 2 Mars derb tahiri, Berrechid, MA-26100 Maroko.

Esperanto ne helpas min akiri laboron! Aŭ: "... ĝi ne helpas min en mia laboro (se iam mi havos laboron)!" Tiaj estas la malvarm-duŝaj komentoj de senlaboruloj, kiam ili ekscias ke oni instruas Esperanton ĉe Helsinkiaj Senlaboruloj. Venontan aŭtunon mi metos serion de reklamoj sur la anonctabulon por montri al ili ke Esperanto utilas ankaŭ en la labor-vivo. Do, ĉu vi povas respondi al la sekvaj demandoj: *Ĉu Esperanto iam helpis vin en via laboro? Kaj kiel? Ĉu ĝi eĉ ebligis al vi trovi laboron?* Bonvolu respondi al: R.J. Milton, Kulosaaren Puistotie 38-1, FI-00570 Helsinki, Finnlando.

Patro nia — de Meimei, porjunula, bunte ilustrita, mezuro 17x26cm, 94-paĝa, kun rakontoj, ĵus eldonita de Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, korespondadreso: Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo. Mendebila ĉe UEA, BEL kaj la eldoninto.

28-jara dana fraŭlino el Svedio, komencanto, porcelan-pentristo, deziras havi korespond-amikojn. Intereso: arto, kulturo. Ann Margrethe Rasmussen, Södergatan 109, SE-25227 Helsingborg, Svedio.

Junkora, malnova, solviva esperantisto okcident-eŭropa (70+, 190 cm, 93 kg) deziras konatiĝi kun sendependa, vojaĝema esperantistino por kune ĝui ĉiujn flankojn de la vivo. Ebla renkontiĝo dum la UK en Adelajdo. Bonvolu sendi leteron, prefere kun foto (certe resendota), al la redakcio kun indiko "Privata".

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA

LIBRO DE MIL ZEOJ

MONUMENTE PRI ESPERANTO. Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj. Hugo Röllinger. Red. Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111 p. 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld.

Post 30-jara laborado de Hugo Röllinger aperis ĉe UEA la libro *MONUMENTE PRI ESPERANTO*. Kiel komisiito de UEA Röllinger kolektis informojn pri ĉiuspecaj ZEOj, t.e. Zamenhof/Esperanto-objektoj: stratoj, placoj, parkoj, pontoj, konstruaĵoj, skulptaĵoj, ŝipoj, eĉ asteroidoj. Entute li registris 1044 ZEOjn en 54 landoj de ĉiuj 5 kontinentoj. Tio postulis de li ne nur zorgan administradon sed ankaŭ multe da persistemo, intuicio kaj detektiva kapablo, dank' al kiuj la nuna dokumentaro estas kompleta registro de ZEOj de la jarcento 1896-1996. *MONUMENTE PRI ESPERANTO* enhavas, krom laŭlanda listo de la ZEOj kun indiko pri iliaj loko kaj jaro de ekesto, ankaŭ artikolojn, en kiuj la aŭtoro rakontas kolorplenajn historiojn de multaj el ili. La 111-paĝan abunde ilustritan libron redaktis Thomas Bormann.



LA PLEJ POPULARA LERNOLIBRO EN NOVA VESTO

SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE. Audrey Childs-Mee (1926-90). Rotterdam: UEA 1996 (6-a eld.). 194+40 p. ISBN 92 9017 050 6. 21 cm. Ilustrita de Stano Marček. Prezo: 24,00 gld.

Audrey Childs-Mee estis unu el la plej popularaj instruistoj de Esperanto. Tiu ĉi rektmetoda lernolibro rezultas el ŝiaj spertoj pri instruado en multaj landoj. *SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE* taŭgas por uzo en memlernado kaj kursoj. De pli ol dek jaroj ĝi estas la plej populara internacia lernolibro de Esperanto. Ĝia sesa eldono aperis kun gaja plenkolora kovrilo.

 **Sonkasedo estas aparte havebla. Prezo: 12,00 gld.**

KAJ PLIE...

INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE UEA/ILEI. Gvidilo por prepariĝi al la elementa kaj meza niveloj. Represo. 36 p. Prezo: 4,80 gld.

POLITIKA HEGEMONIO KAJ LINGVA HEGEMONIO EN EŬROPO. A. Chiti-Batelli, P. Janton. Propono por la eŭropa strategio de la Esperanto-movado. Esperanto-Dokumento n-ro 33E. 19 p. Prezo: 4,80 gld.

SENĜENAJ DIALOGOJ. Alberto Fernández. UEA fariĝis la ĉefdistribuanto de tiu ĉi fascine verkita kaj riĉe ilustrita libro pri la fundamentaj natursciencaj demandoj. 197 p. Prezo: 18,00 gld.

ZAMENHOF, BILDRAKONTE. G. Tilleux, B. Disano, J.M. Derzelle. UEA estas nun distribuanto ankaŭ de jena plenkolora bildstria biografio de Zamenhof. Grandformata. 18p. Prezo: 15,00 gld.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefona: +31 10 436 1044 Telefaksa: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŬIAKTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŬIAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1997 **KŬIAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1997

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	38 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	34 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	700 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	29 guldenoj	Portugallio	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	31000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	100 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto
tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994
(2-a eld.). 96p. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Malta Esperanto-Societo invitas vin partopreni en la
SESA INTERNACIA TURISMA SEMAJNO EN MALTO
de la 3-a ĝis la 9-a de septembro 1997.

Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe:

Malta Esperanto-Societo,
P.O. Box 142, Valletta CMR 01, MALTA.



Internacia Junulara Semajno (IJS)

17.07-23.07.1997. Pécs, Hungario

Temo: *Mez-Eŭropo*

Belega urbo kaj pitoreska ĉirkaŭaĵo, amuziĝoj spiritaj kaj korpaj, prelegoj
pri hieraŭ kaj morgaŭ de la regiono, bonaj vinoj, ĉarmaj knab(in)oj —
la renkontiĝo por Vi! Speciala programo por infanoj! Poste karavano
rekte al IJK en Assisi! Aliĝilojn petu de HEJ, Pf. 87, HU-1675 BUDAPEST,
<hej@vma.bme.hu>.

SOLENA SESIO, 14/04/97

Omaĝe al Esperanto la Ĉambro de Deputitoj de Federacia
Distrikto de Brasília, proponas de Deputito Renato Rainha,
okazigis solenan sesion en tiu dato, senprecedenca realigo
kiun la tutmonda esperantistaro, ties amikoj kaj familianoj
bv. amase per dankleteroj saluti, menciante la nomon de
la sukcesinta Deputito. Brazila Esperanto-Ligo iniciatis ĉe
la Sekretariejo de Eduko de DF prizorgon por ebligi al
profesoroj instrui Esperanton, ankaŭ enkondukatan en la
Akademio de Civila Polico kaj Centro Interlerneja de Ling-
voj. Adreso por la mesaĝoj: Deputada Lúcia Carvalho,
M.D. Presidente da Câmara dos Deputados, SAIN, Parque
Real, Brasília, DF. BR-70086-900.



En 1996 250 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
mecenatoj de UEA. Vi ricevos leterojn de la
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK
kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en
1996 estis bela SZ-globkraĵono. La
kotizon (duoblo de MA por via
lando) vi povas pagi al via peranto
aŭ rekte al UEA.



Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo,
1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

Patrino koro

*Simplaj, romantikaj
rakontoj pri la
esperantista vivo*

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La
Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./
preso). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld.
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.